

Bô Yin Râ

**LA LIBRO  
DE LA AMO**

KOBERSCHE VERLAGSBUCHHANDLUNG AG  
BERN

Unua eldono 1922  
Definitiva eldono 1931

El la Germana originalo  
(„Das Buch der Liebe“, eldono de 1931)  
tradukis A. Rehfeldt (<http://www.a-rehfeldt.de>)

© 1929 kaj 1978  
êe Kober Verlag Bern, Svislando

## Enkonduko

En tempo, en kiu la ŝlimkirlantaj ondoj de la *mal-amo* malhonoras la kampojn de la tuta homaro, tiu ĉi libro parolu al vi pri la *amo*!

Vi, kiu volas sperti *sin mem*, tie ĉi trovu la plej altan *liberecon*!

La *liberecon*, kiun via animo bezonas, kiel viaj pulmoj bezonas *aeron* por spiri, povas doni al vi nur la *amo*, kaj *sen amo* mortas en vi la *vivoĝermo*, el kiu vi elkresku por kreskado, kiu en si mem ne konas finon. —

Tie ĉi estos parolate pri *forto*, kiu spirite majstras ĉiujn fortojn de tiu ĉi tero, — pri forto, kiun nur tre malmultaj homoj spertas en si, ĉar kvankam ili konas multon, kiun ili *nomas* „amo“, ili tro facile kontentiĝas, sen enprofundiĝi en sian propran profundon, kie la forto de la amo povus malkaŝi sin al ili.

Sed nur *tiu*, kiu *en si mem* esploras sian plej profundan profundon, trovos tie la *bazon* de la saĝaj amoinstruoj konservitaj en la tekstoj de malnovaj sanktaj libroj, tekstoj, kiujn probable „konas“ ĉiu, kiun la *vortoj* de tiuj libroj atingis, sed kiujn nur malofte iu kaptas en sia *spirito*, ĉar neniu suspektas,

ke manifestiĝas en tiuj instruoj *leĝo*, antaŭ kiu eĉ la plej potenca homo devas klini sin, se li ne volas, malgraŭ sia tuta potenco, pli aŭ malpli frue frakasiĝi je si mem.—

Se oni *scius*, kio *amo* vere *estas*, la vizaĝo de la tero *jam antaŭ longe* estus *ŝanĝiginta*, kaj ĉiu vivo estus eliginta sin el ĉiam nova turmento. — — —

Eĉ hodiaŭ la vortoj de *Dia saĝo* temantaj pri tiu *amo* estas *vualitaj* per densaj vualoj, kaj nur malofte rarulo sukcesis, por sia ekkono, fortiri tiujn vualojn.

Kion li ekkonis, tio ne plu estis tiu „*amo*“, kiun li *antaŭe* kredis ekkoni, ĉar li nun ekkonis *prapotencon*, kiu sendis tremojn tra lia tuta korpo, — kiu tremigis lin en plej interna travivado kaj faris lin *reganto*, kie li antaŭe estis *sklavo!* —

Pri *tiu amo* tiu ĉi libro sciigu vin!

Al *tiu ĉi amo* ĝi konduku vian animon!

El *tiu ĉi amo* *vivas* tiu, kiu ĉi tie parolas al vi pri tiu amo.

Nur iu, kiu *vivas* el *tiu ĉi amo*, *konante* ĝin el *vivado* kaj *spertado*, havu la rajton doni ateston pri la amo...

Nur li vere *povas* paroli pri la neimageble alta forto, pri kiu temas ĉi tie .

Ekzistis homoj, kiuj kredis esti en *amo* tial, ke ili ne povis *malami*.

Sed tiu ĉi *nekapablo* neniom garantias, ke oni konas la *amon*.

Malamo estas la *kontraŭpoluso* de amo, estas la *sama* forto en sia *inversigo*, – kaj kiu ne estas *kapabla* malami, kvankam ekkoninte, ke nur *malsaĝo* sin *fordonas* al malamo, tiu ankaŭ neniam trovos en si tiun amon, pri kiu *Paŭlo*, kiu vere estis amanto, diris:

„*Se mi parolus la lingvojn de homoj kaj anĝeloj, sed ne havus amon, mi fariĝus sonanta kupro aŭ tintanta cimballo.*“ – – –

Li certe ankaŭ ne komprenos la sencon de la legendo, kiu rakontas pri *Ŝakjamunio*, la Hinda budho, ke iam malamiko lia pelis furiozan elefanton renkonte al li; sed la iluminiĝinto, mirigante ĉiujn ĉeestantojn, haltigis la animalon, tiel ke ĝi tremante genuiĝis antaŭ li, ĉar li sendis renkonte al ĝi la fortojn de *amo*, kiujn li havis en si...

Kaj la Hinda legendo kaj la vorto de *Paŭlo*, „instruanto de popoloj“ predikanta la Kriston Jesuo, sugestas al pli profunde pensema homo, ke tie ĉi ne estas la parolo pri ebrie ekzalta *sentado*, sed ke estu glorata la alta *forto*, pri kiu mi komence diris, ke ĝi estas la spirita mastro de ĉiuj teraj fortoj. –

*Diversformaj* estas la manifestiĝoj de tiu forto en la surtera vivo.

Vi trovas ĝin en ĉiu planto, ĉiu animalo; kaj ĉiu seksa instinkto atestas ĝian potencon...

Sed en tiuj manifestiĝoj ĝi troviĝas ankoraŭ sur la *plej malsupra* ŝtupo de sia agado, kaj vi certe ne ekkonos tie ĉi ankaŭ ĝian *plej altan* formon de agado, kvankam manifestiĝas en ĝi multege *pli* ol vi ĝis nun povis ekvidi. — — —

Se vi iam estus lasinta la *krean tremmentadon* de ekflamigitaj pariĝaj instinktoj, en tiu ĉi *plej malalta* formo de la amo, servi al vi kiel ateston, — kvankam tio vere devus sugestiĝi al vi, — tiam vi jam antaŭ longe estus veninta al la ekkono, ke tia *prapotenco* certe kapablas fari *pli* ol generi el tio tera ion teran! —

Vi jam antaŭ longe estus ankaŭ ekkoninta, ke tiu *krea tremmentado* devas esti propraĵo ankaŭ de la *plej alta* formo de la amo, kaj vi certe ne estus subfalinta al la dolĉa eraro, ke milda *sento de simpatio* kaj *de pia moleco* ŝajnas esti sufiĉa por *ne* esti, laŭ la vortoj de tiu amanto, „tintanta cimbalo“ kaj „sonanta kupro“. —

Ĉio, kion la tie ĉi menciita vera amanto aldone diras pri la *maniero de montriĝo* de la amo, estas nur la *signoj* kiuj *sekvos* la amon, tie, kie ĝi manifestiĝas en sia *plej alta* formo. —

Sed vi erare pensis, ke tiuj ĉi *signoj* estas la *amo mem*, kaj vi nun penas estigi la *signojn*, kiuj doniĝus al vi *per si mem*, se vi *havus* amon! — —

Mi devos kuraci vin de kelkaj eraroj, se mi volas *fari vin kapabla* ami...

Vi ankoraŭ estas implikita, ekde via plej frua juneco, en miljara eraro.

Tiuj, kies tasko estis *instrui* vin, *mem* estis aŭdintaj nenion alian ol kion ili transdonis al vi.

Estus tre malsaĝe, se vi volus koleri kontraŭ ili.

Ili donis *al vi*, kion oni antaŭe donis *al ili*, same kiel nun *mi* donas al vi, kion oni iam donis *al mi*, antaŭ ol mi mem kapabliĝis ĉerpi per mia propra ĉerpilo.

Sed eble vi ekkonos, ke *ne estas malgrave*, el *kiuj* fontoj la vazoj de instruantoj ĉerpas. —

Se vi jam konas la instruojn, al kiuj mi donis formon en miaj *aliaj* libroj, vi scios, ke fluas por mi *plej profundaj rokofontoj*, el kiuj fluis ĉiu spirita saĝo, kiu iam fekundigis tiun ĉi teron.

*Bone* estas al vi, se la „*viva*“ akvo de *tiuj* fontoj refreŝigos vin!

*Bone* estas al vi, se vi ne „ofendiĝas“ pro miaj vortoj, kvankam mi estos devigita montri al vi, ke vera spirita revelacio daŭras *eterne* kaj ĉiutempe scias krei al si revelacianton.

Mi certe ne estus tiu, kiu mi estas, se mi provus senvalorigi tion, kio en la religiaj instruoj de la antikva tempo originis de samspeculoj miaj.

Kaj ĉio en *ĉiuj* ĉi instruoj de la pli aŭ malpli proksima Orienta mondo, kio vere portas la signon de la *spirito de l'eterneco*, estis iam donata per la revelacado de tiuj, de kies speco mi estas.

Sed mia „linio de deveno“ etendiĝas multe pli foren ol la biologia geneologio de la tera homo, kiu servas al mi kiel instrumento: – kiel surtere necesa vehiklo...

Kaj mi nur alvokas vin, ke vi estonte distingu inter tio, kio estas *spirita dono* tia, kian povas doni *sole* la homoj unuiĝintaj kun la spirito, kiuj sin malkaŝas nur tre malofte al tiu ĉi mondo, – kaj tio, kio apartenas al sterila, cerbe ŝveligita *homa opinio* en tiuj skriboj de antikvaj popoloj, kies vortojn vi senescepte rigardas kiel misteran honorindaĵon.

Kiel vi povas lerni *distingi* la antikvajn vortojn, vi sciiĝos de mi.

Mi tie ĉi instruas vin kiel la sola el miaj samspeculoj, kiu nuntempe agadas publike, – kaj kiel la sola tera homo, kiu nuntempe povas diri pri si, ke li vortigas sole nur *spiritan donaron* estigitan en la eterneco.



## La plej granda amanto

Se tie ĉi senvualiĝu al via interna vidado la lumforto de la *amo*, tiam prave decas, ke ni unue rememoru la *plej grandan* amanton inter ĉiuj, kiuj iam surtere havis homan vizaĝon.

Eble vi mem *apartenas* al lia konfesantaro, aŭ vi staras *malproksime* de la kredoformoj, kiuj surbaze de lia instruo estiĝis dum la fluo de la jarcentoj kaj ofte entenas spurojn de lia instruo nur en la formo de *instruaroj konstruitaj el la ruineroj de malnovaj temploj kaj plenaj de memkontraŭdiraĵoj*, – sed vi apenaŭ povos indiferente preteriri lin, kie ajn rakontoj pri lia vivo eble prezentas al vi lian instruon.

Certe, – la sciigo pri lia vivo estas multmaniere *distordita*, kaj vi povos esperi trovi en ĝi nur malmultajn vortojn *en ilia pureco*, tiel kiel la alta majstro diris ilin al la siaj.

Tamen, sufiĉe da *aŭtentikaj paroloj* eklumas eĉ *el sub la ŝutkovraĵo*, kaj kiam vi interne kapabligis vin mem *apartigis tion aŭtentikan*, la ruinaĵo de antikvaj paganaj kultoj kaj la opiniaro aldonita de la antikvaj skribintoj de la raportoj certe ne plu povos misprezenti al vi la *veran* bildon de la majstro.

Vi devas nur lerni *ekzameni* senantaŭjuĝe, kion oni kutimas prezenti al vi kiel ŝajne „samtempan“ ateston pri tiu homa vivo, kiu restis enigmo al la homaro sia-tempa kaj posta ĝis la hodiaŭa tago...

Ĉar oni ne kuraĝis tuŝi la malnovan sciigon, en kiu la instruaj paroloj de la majstro estis ricevintaj alian formon fare de *aliuloj* jam dum la unua tempo, ĉiu kredo, kiu volis *interpreti* tiun instruon laŭ *sia* maniero, havis plenan liberecon, tiel ke nuntempe estas vana entrepreno esplori la rezultintajn kredopiniojn pri la fina *vero* de tiu instruo.

Ĉi tie vi devos esplori *pli profunden*, se vi volas *trovi*, kaj kiam vi estos *trovinta*, vi povos doni al la kredopinio, *kiu gvidis vin ekde via frua juneco*, la profundon, en kiu troviĝas *fundamento*.

Estas malproksima de mi la deziro konsili al vi, ke vi forlasu vian konfesian rondon, kaj vi interpretus erare la instruon, kiun mi donas, se vi eble opinius, ke mi intencas fondi *novan* religian rondon.

Vere ne mankas al ni bonaj *kredoformoj*, sed eble mankas al ni hodiaŭ *kredantoj*, kiuj montras sian kredon en siaj *agoj*!

Nenio estas pli malproksima de mi ol la malsaĝa, vanta deziro plimulti la ekzistantajn kredoformojn per ankoraŭ nova!

Sed mi *volas*, kaj laŭ spirita devoligiteco *devas*, doni al *ĉiu* kredo la *pliprofundigon*, kiun ĝi bezonas, eĉ se ĝi, estante treege certa pri sia propra valoro, nomas sin la „*sola vera*“ kredo...

Kion la instruo formita de mi havas por doni al vi, tion vi retrovas en la fundo de *ĉiuj religioj*, kiam vi *unufoje ekkonis* ĝin – *tie*, kie la formoj de *via* religia kredo estas al vi *bone konataj helpantoj*.

*Praa saĝo* tiel malkaŝas sin al vi, kaj la plej profunda *pra-fundo* de ĉiuj „kredobazoj“ evidentiĝas al vi. –

En ĝi radikas *ĉiu* kredoformo, el kiu ajn antikva aŭ nova mito ĝi prenas siajn simbolojn.

Ne estu tro rapide kontenta pri *juĝo*, kiun aliuloj *enmetis* en vin, tiel ke ĝi nun ŝajnas al vi estiĝinta *el vi mem*.

*Konfidu al vi mem*, se vi *volas*, ke vekigu en vi la *kapablo* juĝi en tiu ĉi kampo.

Tio, kion aliuloj diris al vi, ne *devas* konfuzi vin, se *vi mem* deziras proksimiĝi al la vero.

Nur en *via propra vero* vi povas distingi la lumon de la *vero* disde *trompa lumo* kaj *trompiĝo*.

Ni do serĉu la bildon de la majstro, kiom ĝi ankoraŭ estas elprenebla el la sciigo, kiu – laŭ homa, tro

homa maniero – miksis plejsanktaĵon kun la propra opinio.

*Jehoŝŭa*, la majstro el Nazareto, volas malkaŝi sin mem al vi tie ĉi per mia vorto...

Ne influite de antaŭjuĝoj aŭ aliula opinio, provu senti en vi, kion mi havas por prezenti!

La saĝa instruanto, kiu trairas sian landon, estas *judo* kaj unue volas esti komprenata nur de *judoj*. Tiu ĉi veraĵo eterne ne povas esti ŝanĝata, ankaŭ ne de manie freneza rasa malamo, kiel ajn oni provas aserti, ke la plej granda filo de la juda popolo ne estis judo.

Estante judo, li *devas* ĉerpi el la spirita trezoro de *sia popolo*, se la enhavo de *praa saĝo* fariĝu ekkaptebla por tiuj homoj, al kiuj *li* volis fariĝi instruanto. Li unue sentis sin sendita *sole* al la „Izraelidoj“, kaj en la sinagogoj li penas montri la veron de sia instruado „per la Skribo“: – la antikvaj religiaj libroj de la ortodoksa judaro.

Sed tio neeviteble estigis ĝermon de eraro: liaj aŭskultantoj inklinis rigardi lin *kiel instruanton de sia kredo*, kaj ĉiun vorton, kiu atingis ilin *simpla kaj rekta*, ili *kurbigis* laŭ sia propra strange komplika interpretado de la kredo de iliaj patroj.

Li ĉiam penas *kontraŭi* kaj forigi tiun eraron, sed en sia spirita vivo kaj spertado li estas jam multe *tro malproksima* de ilia *malvasteco*, ol ke li ankoraŭ po-

vus ekkoni la gradon de „surdeco“ de siaj aŭskultantoj.

La plendo, ke tiu ĉi popolo ne povas „aŭdi“ lin, ofte troviĝas en lia parolo.

Li *veas* la popolon, kiu „havas orelojn por *ne* aŭdi“, por ke ĝi mem kuru en sian pereon.

Kaj kiam la fino de lia vivo, jam longe antaŭsentita, reale proksimiĝas al li, lia tuta alta kuraĝo disfalas en amara lamento, kaj li *priploras* Jerusalemon, ĉar ĝi *ne ekkonis* dum lia vivo, kion li volis alporti al sia popolo...

La malmultaj, kiujn li tamen elektis, ofte devas aŭdi malmolajn parolojn pro la malvasteco de siaj koroj, kaj nur malofte li konfidas al ilia komprenekapablo.

Kelkfoje li deziras persvadi sin mem, ke tiuj laŭekstere fidele memdonaj al li devas ja esti kompreninta lin vere ĝuste, sed tiam li ree vidas, plena de doloro kaj kompatato, kiom *malproksimaj* iliaj koroj estas de lia instruo.

Li iras tra Palestino, parolas en la kamparaj sinagogoj, por vidigi la spuron de la saĝo en la antikvaj *skriboj*, – parolas antaŭ la *popolo* en la *popola* lingvaĵo, por vekti la *korojn*, – konfidas al la *amikoj* la *sekreton* de sia misio, kiun ili ne povas interpreti, estante tro forte implikitaj en naciaj revoj pri la Me-

sio, – kaj estas komprenata de *neniu*, krom tiu, „kiun li amis“.

Li parolas pri sia „*Patro*“, kaj ili kredas, ke li parolas pri *ilia triba dio*, kvankam li kun plena klareco rifuzas servon al tiu „dio de venĝo“, kiu parolis „al la antikvuloj“, kaj li anstataŭe, *neniigante* per spirita forto ties laŭsupozan „ordonon“, instruas: „Sed *mi* diras al vi...“

Li parolas pri sia alta *misio*, kaj ili supozas, ke li volas restarigi ilian *eksteran* teran regnon, kvankam li jam sciigis ilin, ke *li* estas reĝo de regno, kies eterna ekzistado baziĝas sur potenco „*ne* de ĉi tiu mondo“.

Li parolas pri tio, kio en li fariĝis „*karno kaj sango*“, kaj instruas *enkorpigon de la spirito*, – sed ili komprenas, ke lia *korpo*, kiun la tero donis al li, devas fariĝi *ilia tera manĝo*.

La mizeruloj, kiujn li povis kuraci de malsanoj – per la *kuraca forto* kiu kuŝis en lia *tera korpo* kaj apenaŭ *tuŝis* la spiritecon, kiun li ekkonis kiel sian *esencan eston*, – konfidis al li kiel al sia helpanto, sed ili ne suspektis, ke li estus povinta doni al ili la saman fizikan helpon, eĉ se li spirite *ne* estus estinta tiu, kiu li *estis*...

Ĉu oni povas malaprobi, ke *lia tereca naturo* fariĝis viktimo de horo de malforteco, tiel ke li konfidis al la *vokoj de „hosana“*, promesantaj al li *teran po-*

*tencon*, – ke tia potenco ŝajnis al li alloge proksima, kvankam *li* volis utiligi ĝin nur por la *animoj*? –

Tie ĉi estas la momenta implikiĝo en kulpo, kiun eĉ tiu ĉi vivo ne povis eviti, ĉar *neniu*, kiu iam vivas sur la tero, restas libera de *kulpo*!

Li preskaŭ *serĉis*, pro sia plej alta spirita tasko, *la morton per homa mano*, ĉar nur en *tia* morto li povis doni *tion finan*, kion *nur* li havis por doni, – sed tiu morto venis al li vere *tro frue*, kaj necesis plej alta forto por memvole akcepti ĝin, tiel ke li el la profundo de sia animo petis sian „Patron“, ke li donu al lia sorto alian direkton, „se povas esti“. –

Li kredis povi iam diri al siaj disĉiploj ankoraŭ „multon“, kiun ili tiutempe, kiel li klare vidis, ne povis „nun elporti“...

Sed kiam sendito de la *lumantaro*, al kiu li apartenis, fine montras al li en tiu timoplena punkto en Getsemane, ke la vojo, kiun li formis *al si mem*, ne plu povas esti redirektata eĉ de la „*Patro*“ de ĉiuj apartenantaj al tiu lumantaro, – tiam li revenas *en si mem* por trovi sin en la *pastoreĝeco de la lumanto*, kaj iras *heroe* la lastan, malfacilan iron, ŝarĝite per la ligno de la krucforma pendigilo.

Sur tiu tortura krucumo, kiu pli malfrue donis *novan* interpreton al antikva sankta simbolo de antaŭlonge malaperintaj respektindaj kultoj, li plenumis la finan agon de amo – *sekreto* por ĉiuj, kiuj tie staris

ĉirkaŭ li, kaj eĉ *hodiaŭ* sekreto por ĉiuj, escepte de malmultaj „vidantoj“. — — —

Neniu pensu, ke tiu ĉi *morto* en si estis la *enhavo* de tiu *fina ago de amo!*

Tie ĉi estas mistero, kiun mi jam aliloke, nur ti-meme, kuraĝis senvualigi, — kaj nur, ĉar devo ordonis tion al mi...

Kio povas tion akcepti, tiu akceptu!

Tie ĉi, *fluego da spirita forto* estis malfermata al ĉiu homa spirito per la *amo*, pri kiu sciigas vin tiu ĉi libro, — fluego da forto, kiu estis malfermebla nur per la ofero de plej potenca *amanto*. —

Tie ĉi, la „dio“ de *venĝo*, — la plej malbona demono inter la nevidebluloj en la fizika kosmo, — estis venkata de tera homo *per la absoluta ekstermo de ĉia sento de venĝemo*: — ago, kiu povis ebligi nur al la plej alta formo de praspirita *amo*...

Kion la malnova raporto krome sciigas al vi pri tio, kio laŭdire okazis *post* la morto de la plej granda amanto, estas — se vi volus rigardi ĝin *historie* — *mito*, sed tiu ĉi mito entenas plej profundan *veron*.

Certe, la majstro „*releviĝis*“ el la tombo; sed lia *tera korpo* vere ne plu estus povinta utili al li.

Certe, la „*junulo vestita per blanka robo*“ ne estis trompiĝo de timoplenaj virinoj, — sed atentu la pluan



spuron de la vero, kiun la skribinto de la malnova raporto ne povis forigi, – kiu videble estis neekkonebla kaj nekomprenebla al li, – kaj kiun li tamen devis skribi *kontraŭ* sia volo, kiom ajn li poste penas forviŝi ĝin: –

*Ne estis disĉiploj* de la alta majstro tiuj, kiuj forprenis lian kadavron, tiel ke la kronikisto povis kun bona kialo aserti, ke ankoraŭ ekzistas erara „*famo*“ pri tio.

Sed ofte dum sia vivo, kaj malproksime de aliuloj en la soleco de la montoj, la majstro estis renkontinta *aliajn* homojn, kiuj *ne* apartenis al lia popolo, sed estis *liaj samspeculoj*, unuigitaj kun li en tiu *rondo de lumantoj*, al kiu li spirite apartenis kiel frato...

Kiam li foje prenis kun si tri el siaj dek du disĉiploj kaj iris sur la monton, kie li kutimis „preĝi“, kaj ili ekvidis lin „aliformita“ en lia *spirita formo*, la tri fideluloj kredis, vidante du virojn en blankaj vestaĵoj apud sia majstro, ke tiuj certe devas esti du el la *antikvaj profetoj*, – „Moseo“ kaj „Elija“, – tiel ke la majstro, kiam li seniluziigite vidis ilian eraron, ordonis al ili, ke ili ne parolu pri tio al la aliaj. – – –

Li vidis, ke lia tuta instruado ne povis liberigi ilin el la *malvasteco de ilia triba kredo*, kaj ke estiĝus nur konfuzo, se li volus forigi la eraron. –

Sed tiuj „viroj en blankaj vestaĵoj“ kaj la „junulo“, kiun la virinoj trovis en la tombo, ne estis fremdaj al

si reciproke, kaj ĉar ili volis, ke ne estiĝu kulto pri la *kadavro* de la alta frato, ili faris, kion oni eĉ hodiaŭ faras kun la restaĵo de homo laŭ la moro de ilia lando: – ili transdonis ĝin al la konsumanta flamo, farinte ĉiujn preparojn por tio en loko bone elektita kaj projektita kontraŭ ĉia ĝeno...

Mi tie ĉi parolas estante sciigita de *tiu*, kiu vere povis diri pri si, ke li restos kun la homoj „ĝis la maturiĝo de la mondaĝo“, – sciigita de *tiuj*, kiujn mi povas nomi miaj altaj fratoj, kaj kiuj *mem* en tiu nokto enigis la gardistojn en profundan dormon, por plenumi kun prudenta zorgemo la volon de la frato, volo kiu estis ankaŭ ilia. –

Mi scias, ke tie ĉi multaj kulpigos min pri mem-trompo, kaj ke eĉ pli malbonaj riproĉoj estos farataj kontraŭ miaj vortoj, kun aroganta memkontenteco, de „blindaj blindulgvidantoj“.

Estas karakterizaĵo de kriplaj animoj, ke ili neas ĉiun vivomanifestiĝon, por kies perceptado mankas al ili la spiritaj organoj.

Mi scias, ke mi tie ĉi tuŝas aferojn, kiujn kelkaj rigardas kiel „*netuŝeblajn*“, – sed la liberiga instruo de la plej granda amanto vere estas glorata *pli* de la *vero* ol de la plej antikva, laŭkutime tradiciita, nekonscia pia *trompo*, – kiu cetere ne restas trompo, kiam oni

rigardas ĝin kiel *poezian formaĵon*, kiu intencis teksti al la vero simbolan robon...

Ankaŭ la *amasa vekigo*, kiu poste okazis je la „Pentekosta tago de la judoj“ en Jerusalemo, ne povis detiri la vualojn for de la animoj de tiuj, kiuj nun *kredis* je la majstro pro tio, ke ili estis plurfoje „vidinta“ lin post lia morto.

*Tro forta* estis la *kateno* de tiuj animoj, ol ke la „*spirito de la vero*“, kiun la majstro iam estis promesinta, povus perfektigi ilin.

Tial *Paŭlo*, tiu vera *amanto*, kiun oni nomas „apostolo de la paganoj“ kaj „instruanto de la gentoj“, estis en tre malfacila situacio, kiam li – kiu *vere* estis profunde spertinta en si la „*spiriton de la vero*“ kaj tiam *sciis*, kiu la alta majstro *estis* – renkontis la tro firme ligitajn virojn, kiuj povis nomi sin la *disĉiploj* de la „Kristo“.

Tamen, ankaŭ la estinta disĉiplo de la Fariseoj, kiu fariĝis la proklamanto de la Kristo, ne liberiĝis de ĉiu antaŭjuĝo kaj poste bonafide almiksis malnovaĵojn, al li familiarajn, al la instruo de la majstro, kvankam li havis *multe pli klaran* vidadon ol tiuj aliaj, kiuj nomis sin la „senditoj“ de instruo, pri kiu la majstro mem parolis, nomante ĝin *bona, ĝojiga mesaĝo*.

Bedaŭrinde fariĝis tre *malmulte ĝojiga* la instruo, kiu kun la paso de jarcentoj atingis potencon super la

animoj, baziĝante kun aroganta memkontenteco sur la „bona mesaĝo“ de la majstro. –

Sed *Johano*, kiun laŭ la malnova raporto la majstro „amis“, restis *en la kvieto* kaj la kvietuloj tenis sin je li.

Nur *li* posedis, kion *la majstro* mem propramane estis *skribinta* por li, kaj nur malfrue li lasis malmultajn, kiuj ŝajnis al li indaj, kopii ĝin.

Se Jesuo reale estus instruita *nur buŝe* kaj skribinta nenion, kiel oni ordinare kredas, vere *eĉ ne unu* el liaj vortoj estus atinginta nian tempon! – –

Kiel mi jam diris aliloke, la originalo kaj la kopioj poste estis neniigataj *de tiuj mem*, por kiuj ĉi tiuj *majstroskriboj* estis ilia plej alta trezoro, pro timo, ke tio ĉi *sankta* povos iam esti *profanata*.

Ankaŭ *tiu ĉi* fakto estas al mi konigita nur de tiuj unuigitaj kun mi en la Pralumo, kiuj *solaj* povas „*scii*“ tie ĉi, sed povas esti, ke venontaj generacioj trovos tekstajn kaj aliajn spurojn, kiuj tiam montros ankaŭ *de ekstere* la verecon de miaj vortoj; ĉar en spirita perceptado mi vidas tiajn fragmentojn kaj teksterojn en la regiono de la tero, kvankam mi ne scias determini la lokon, kie ili kuŝas...

*Certaj* spuroj ja estas klare videblaj *por ĉiuj* en tiu parto de la malnova sciigo, kiun oni *atribuas* al tiu, kiun la majstro „amis“. –

La malperfektaĵoj de tiu ĉi parto de la malnova sciigo fariĝas facile kompreneblaj, se oni scias, ke ĝia aŭtoro, kiu estis en proksima rilato kun la disĉiplaro de Johano, uzis la „majstroskribojn“ kiel *bazon*, kaj volis nur *kunligi* kun ĝi tion, kion li krome posedis: tradiciojn kaj legendojn en fragmenta formo.

*Neniom* de tio, kion oni *atribuas* al la disĉiplo, kiun la majstro „amis“, estas skribita de lia mano, sed la speco de la skriboj, kiuj portas lian *nomon*, estas ne tre malproksima de tio, kion li *povus* esti skribinta, – se li *estus* skribinta.

Sed ĉiuj ĉi demandoj gravas nur al tiuj, kiuj deziras ekkapti *de ekstere* tion, kio estas ekkaptebla *nur en la plejinterno*. –

Kaj nur ili demandas ankaŭ, kiu donis *instruon* al la alta majstro, kaj ili volonte atentigas fabelojn, kiuj rakontas, ke Jesuo dum la tempo, pri kiu la raporto *silentas*, estis en *Hindujo*, – aŭ ke li perfektigis sin en *Egipto*.

*Neniom* de tio estas vera.

Lia tera patro ja serĉis laboron en *Egipto*, kie tiutempe oni bone pagis al metiistoj, laboron por subteni sian familion kaj reiri hejmen kun la resto de la lukro, kiel eĉ hodiaŭ faras metiistoj de Italujo kaj aliaj landoj, sed tiutempe la homo, al kiu pli malfrue montriĝis lia *luma naturo*, estis ankoraŭ *infano* kaj vere ne

sufiĉe matura por atingi la perfektecon de sia tera naturo, perfektecon kiu estas necesa por ĉiu, kiu estu terakonscie spertonta sian lumadon en la Pralumo.

Sed li vere ne bezonis direkti siajn paŝojn al Hindujo, ĉar kio devis atingi lin „el Hindujo”, tio *venis al li*, kaj la belega bildo de la „saĝuloj el la Oriento“, – la *pastroreĝoj*, kiuj estis vidintaj „lian stelon“ kaj nun venis, por alporti al li siajn donojn, – estis nur antaŭdatita en lian fruan infanecon, ĉar la skribistoj mem ricevis nur obskuran sciigon pri tio, kaj ĉar tiumaniere la okazaĵo pli utiligis al la mirakleco, kiun ili volis kunligi jam kun la frua infaneco de la majstro.

Sed ke *io spirita* povas fariĝi ekkonebla *nur en la spirito*, estis penso tiom fremda al la piaj antikvaj kronikistoj, kiom ĝi estas fremda al niatempaj homoj avidaj je mirakloj, kvankam la majstro ja diris, ke oni serĉu Dion nur „*en la spirito*“. –

Dum la ekstera infana vivo de la majstro necese okazis *absolute neniom* da „mirakleca“.

Li estis infano kiel liaj ludkamaradoj, kaj kiam li havis sufiĉan forton por helpi sian patron en ties peniga metio, li lernis la metion, kiel ĉiu ĉarpentisto, al kies taskoj tiutempe apartenis, krom la konstruado de domoj, ankaŭ diversspeca alia lignoprilaborado.

Sed lia *interna disvolviĝo restis sekreta*, kiel ĉe ĉiu, kiu estas de la *sama* spirita speco, kaj tio, kion tiu

spirita disvolviĝo postulis, neniel malhelpis eksteran agadon.

Li, kiu tiumaniere, kiel tera homo, lernis ekkonisian *spiritan potencon*, kiu estis perfektiginta jam longe antaŭ ol lia patrino povis doni al li la teran korpon, ne staradis flanke, kiam la *vivo* vokis, ĉar neniam li estus atinginta sian altan celon, se la vivo estus restinta *fremda* al li.

Li estis *metiisto*, ĝis venis la horo, kiu vokis lin al *io alia*, kaj tiam li povis montri, ke li sciis „*legi*“ en la „skribo“ pli bone ol la eruditaj „skribistoj“, sen esti, kiel ili, iam „lerninta“ ĝin.

La fakirajn miraklojn, per kiuj la kronikistoj superŝargis lin, li *neniam* faris, – sed pli ol unu „miraklo“ atribuita al li estas multenhava *simbolo*, kaj tial: plena de *vero*, dum lia denaska *forto de kuracado* kapabligis lin fari ion, kio estis granda „*miraklo*“ por lia medio, sed havis absolute nenion komunan kun lia spirita misio.

La tekstero diranta, ke *li mem* atentigis pri kaj sin apogis sur siaj „miraklaj signoj“ por postuli kredon al sia *vorto*, estas enorma *insulto* kontraŭ *li*, kiu vere *sciis*, kio apartenas al la *korpo*, kaj kio al la *spirito*, kaj nur naiva neekkonado povis – esperante, ke tio donos eksteran konfirmon al la instruo de la majstro,

– atribui al li tiun parolon, en kiu li laŭdire atentigis pri siaj mirakloj.

Tiel oni *nedireble pekis* kontraŭ lia instruo pro la *kaptado de homoj*, kaj ankoraŭ hodiaŭ efikadas tiuj pekoj de malsaĝaj disvastigintoj de la ege distordita instruo, kaj ne estas antaŭvidebla la fino de tiu erarigado!

Mi deziras, ke mi sukcesu *heligi* tie ĉi iometon, por ĉiuj, kiuj ankoraŭ estas de *bona volo*!

La *kredomizero* de multaj homoj, kiuj konas la instruon de la majstro nur en ĝia *distordita formo* kaj kiujn la *ekstera* esplorado pri la malnovaj raportoj ĉiam kondukas al *novaj duboj*, jam antaŭ longe fariĝis tiom netolerebla, ke fine necesiĝas klarigado, kiun oni povis atendi nur de tiuj, kiuj *mem* konas la proklaminton de la instruo kiel *enteksitan viva en ilian rondon*, de kiu li *eliris*, sendite de la „*Patro*“, kaj al kiu li *revenis*, kiam lia tera agado estis *plenumita*.

Nur de *tie* povas veni al la *estanteco* kaj *estonteco* la solvo de kelkaj „enigmoj“, kaj ankaŭ la *scienco*, tiamaniere direktante sian serĉadon, scios *trovi*, kion ĝi trovi *povas*, por tiam konformigi tian solvon al *tiuj* homoj, kiuj povas ekkoni kaj kompreni nur tion, kio estas kvazaŭ „mane kaptebla“. –

Ĉiuj demandoj de la serĉanta homaro, kiuj celas trans la nuran teranimalan vivon de l’homo, iam trovos sian respondon, post kiam oni pli kaj pli lernis



ekkonu la agadon de la spirita hierarkio, kies plej signifa kaj plej grava sendito estis la majstro el Nazareto...

Kiom malĝuste konsilitaj estas ĉiuj, kiuj opinias, ke la alta instruo de *tiu ĉi* saĝulo rekomendas la malfortetan *senton*, kiun oni kutime nomas „*amo al la homoj*“! – –

Al iliaj konsilistoj ofte estis malfacile, interpreti la agadon de la majstro – priskribitan en la raportoj – tiamaniere, ke la interpreto, laŭ ilia opinio, estis pravigita. –

En la raportoj troviĝas aferoj, kiuj estas *ne bone akordigeblaj* kun la milde parolanta figuro kreita en piaj predikoj...

La *fortoplena* homo, kiu malgraŭ la ŝutkovriĝo de la pura sciigo ankoraŭ vivas en la raportoj, ne lasas similigi sin al la dolĉetaĵoj, malfortaj bildoj elpensitaj de magra kredo laŭ la *propra* mezuro...

Kelkaj vortoj de la „skribo“ estas akordigeblaj kun tiaj bildoj nur tiam, se larĝa konscienco laŭ propra bezono intence misinterpretas tian „vorton de la skribo“ kiel „*eksplikon*“, ĝis perdiĝis eĉ tiu malmulto, kiun restigis la frua ŝutkovriĝo. –

Tiuspeca dolĉa eksplikanto de la „skribo“ opinius *blasfema* la penson, ke la alta majstro povus iam en sia vivo esti sentinta en si mem *tiun* formon de la

amo, kiun lia „servanto“ – ĉu permesate aŭ ne, depende de lia konfeso – sentas en sia karno, sed devas nomi „peka“, ĉar li tute ne suspektas ĝian *dian naturon*.

Li opinias *blasfema* la penson, ke tiu ĉi formo de la amo elfluas el la *sama* forto, kiu kreas la *plej altan* formon de la amo, kiu en la vivo de la alta majstro fariĝis *instruo* kaj *ago*, – kiu donis al li la forton por *tiu* ago de amo, per kiu la *pastroreĝo*, kiu li estis, *je la krucumilo kronis la tutan homaron*.

Sed tamen, mia amiko, vi neniam trovos *la amon* kiun la majstro konis, se vi vekas en vi nur dolĉetajn *sentojn* kaj nomas vian *afablecon al la homoj* kunigitan kun *kompato*: „amo“. – –

Malbone konformas al tiu ĉi *malforta bildo* de laŭsupoza „amo“: la majstro plena de malestimo por tio malestiminda, kiu en sia sekvantaro *tordas ŝnuregon por elpeli la vendantojn, kiuj profanis la templon, – kiu per la piedo renversas la tablojn de la monŝanĝistoj, – kaj kiu parolas al la pastroj de sia popolo la malagrablajn vortojn, kiujn ili en sia venĝemo neniam povos pardoni*.

Por similigi tiun agadon al sia propra *nevokiteco*, oni devis inventi la ideon pri „Dia kolero“, kaj oni ne hezitis imputi al la „*Patro ĉiela*“ de la alta *majstro* tiujn *malvirtojn*, kiuj, laŭ timiga antikva instruo de

pastroj, plenigis malluman *triban dion*, kiun la alta majstro spirite batfalis per sia potenca vorto:

„*Sed mi diras al vi...*“

Ne, – se vi volas vidi la *amon* estigi en vi *realon* kaj *vivon*, tiam vi vere devas iri *aliajn* vojojn ol tiujn, kiujn oni montris al vi.

Ĉu vi ne povas kompreni, ke la forto de la *amo* sur sia *plej alta* ŝtupo montriĝos al vi tute ne en *pli malforta* manifestiĝo ol tie, kie ĝi en sia *malalta* formo intensigas viajn tutajn sentadon, agadon kaj strebado, tiom ke vi ofte rompas katenojn, kiuj antaŭe neniam ŝajnis al vi malligeblaj? –

Nur se vi serĉas en vi ion, kio ankaŭ en *plej alta spiriteco* vekas la *samajn* fortojn kaj *primajstras ĉion*, kio *alie tenas vin en ligiloj*, vi povos trovi en vi la *amon*, kiun la majstro *vivis*. – –

Nur tiam vi atingos la *liberecon* de la „*filoj de la lumo*“ kaj la „*pacon, kiun la mondo ne povas doni*“.

Vi ankaŭ ne devas vidi „*ordonojn*“ en la vortoj de la malnova sciigo!

Kredu al mi kaj ne lasu vin trompi de la ŝutkovraĵo: – la majstro neniam uzis la vorton „*ordono*“, kaj li neniam donis „*ordonojn*“!

Eĉ la „*ordonon*“ pri amo, kiun la sciigo mencias, li *neniam* formis.

Kelkfoje li *citis* el la „skribo“: „Amu vian proksimumon kiel vin mem“ – kiam li volis montri al ortodoksaj fanatikuloj de sia popolo, ke ankaŭ li bone konas ilian „leĝon“...

La kutima ligiteco de liaj disĉiploj al „*ordonoj*“ kaj „*observado* de ordonoj“ rezultigis la transformadon de liaj konsiloj en ordonojn. Ili povis *kompreni* liajn konsilojn nur kiel „ordonojn“!

Estante fidelaj observantoj de la malnova regularo de la juda religio, ili bezonis *ordonon*, – kaj *minacon per puno pro malobeo* de la ordono. –

Kiam la majstro parolis pri spirita *feliĉiĝo*, ili formis al si laŭ lia parolo liberamaniere „*recepton*“ pri tia feliĉiĝo! Laŭ ilia malvasta opinio oni bezonis nur observi la „ordonojn“, por povi esti certa de sukceso iam „en la *alia* mondo“.

Ne alie ol se hodiaŭ malklaraj kapoj kredas, ke lumo kaj certeco de ekkonado estas atingeblaj per iuj mistere strangaj „*praktikoj*“, ree kaj ree reklamataj en dubindaj traktaĵoj.

Sed la malmulto da aŭtentikaĵoj, kiun entenis la *plej frua* manuskripto de tiu malnova sciigo, estis nur *resono* de la instruo de l’majstro, kaj plejfavoraokaze raporto pri rememoroj el jam antaŭ jardekoj pasinta tempo...

Vere estas *blasfemo*, atribui al la *eterna spirito* la *respondecon* pri tiaj skriboj. Iliaj aŭtoroj estis *jam ligitaj per iluziaj imagoj* de malnovaj *pridiaj instruoj* traflugantaj ilian tempon en la formo de nova variaĵo, kaj ankoraŭ *ne ĉesis* esti *sklavaj kredantoj de la tria dio*. Tiuj aŭtoroj donis, el sia *propra* malklara ekkono, *novan formon* al la instruo nur malforte revokita en la memoron, kaj ili mem tute ne povis rimarki, *kiom* ili falsis! – –

*Neniam* la alta *majstro* donis „*ordonojn*“ al siaj disĉiploj, alie li *ne* estus estinta la alta lumanto, kiu li *estis* kaj *estas* kaj eterne *estos*.

Lia instruo estis: „*Bone estas al vi...!*“ kaj „*Ve estas al vi...!*“, kiel la instruo de *ĉiuj* liaj fratoj, liaj kunlaborantoj unuigitaj kun li en la regno de la spirito...

Li sciis *glori* kaj sciis *vei*, sed estis malproksima de li la intenco iam „*ordoni*“.

Li, kiel *lumanto* de la Pralumo, vere sciis multe tro certe, ke „*ordonoj*“ neniam povas alporti *benon*, – kaj ke la *savo* estas atingebla nur, se oni deziras ĝin *liberaelekte*.

Se vi *tiel* volas *savi* al vi la instruon de la majstro el la antikva sciigo, tiam vi devos *elstreki* multon, kiun vi dejunece ŝatis kiel valoran. Alion vi tamen po-

vos konservi al vi, ĝuste *tial*, ke vi ekkonis ĝin kiel fremdan aldonajon.

Sed gardu vin, ke vi ne forigu *tro grandan* multon kiel eraran!

Vi certe ne devas elekti modernan racionalismon kiel provilon.

*Atendu* kelkan tempon, ĝis la vera *senco* de miaj vortoj vekis en vi *propran konfirmon!*

Mi donis al vi ĉiujn kriteriojn de la *aŭtentikaj* „vortoj de la Sinjoro“.

Aŭskultu ankaŭ jenon:

Per „*kyrios*“ = „*sinjoro*“ oni ankoraŭ hodiaŭ ĉie, kie oni parolas *greke*, alparolas ĉiun viron, kiu ne estas almozulo.

„*Kyrie eleyson*“, petegas la almozulo, sidanta rande de la strato, la pasanton.

Tio instruu vin ne interpreti erare en tiu malnova sciigo la vorton „*la Sinjoro*“, eble donante al ĝi sencon, kiun ĝi ricevis longe post la morto de la majstro en la estiĝanta nova kulto.

Liaj disĉiploj diris „*rabeno*“ al la majstro, sed ankaŭ *ĉi tiu* vorto povus rezultigi misinterpreton, ĉar hodiaŭ havas tiun ĉi titolon publike nur tiu, kiu estas kultestro de sinagogo.

Sed mi povas diri al vi, ke en juda komunumo oni *eĉ hodiaŭ* donas al pia viro sperta en la Skribo, kvan-

kam li en sia ĉiutaga vivo praktikas komercon aŭ me-  
tion, la honoran titolon „*rabeno*“.

Samamane havis tiun titolon *la ĉarpentisto*, kiu al la siaj „klarigis la skribojn“, ĉar li estis *majstro de la alta lumado*, membro de la *lumantaro* tie ĉi sur la tero, kiu eble fariĝis konata al vi sub la nomo „*blanka logio*“, – nomo, kiu estiĝis nur antaŭ mallonga tempo, kaj kiun mi konservas sole pro tio, ke la bildo elvokata de ĝi estas taŭga.

Liaj fratoj, – spirite plene unuigitaj kun li kiel li kun ili, – nomas lin „*la granda amanto*“, ĉar neniu antaŭ li faris tiun *grandan agon de amo*, por kiu li oferis sin *liberavole*, – ĉar neniu *post* li iam povos fari agon, kiu estus *komparebla* kun lia ago de amo, per kiu la *spirita* „aŭro“ de la tero *ŝanĝiĝis* por *ĉiuj* tempoj kaj por *ĉiuj* teraj homoj, tiel ke ekde tiam estas alireblaj al *ĉiuj* homoj spiritaj regionoj, kiujn antaŭe atingis nur malmultaj unuopuloj per ekstreme malfacila memvenkado.

Mi bone konscias, ke miaj vortoj ne povas *diri* al vi, *kio estas* la amo, kiu fariĝis vivo en la *plej granda amanto*, kiun la tero iam portis...

Mi povas nur montri al vi, kiel vi povas trovi la *spuron* de tiu vivo, malgraŭ la *ŝutkovraĵo*, sub kiu kuŝas la sciigo celanta raporti al vi pri tiu vivo.

Mi profunde deziras al vi, ke vi eksentu pura la *instruon* de tiu vivo en via *plejinterno*, en kiu sola ĝi povas esti ricevata en sia forto, por ke la majstro trovu en vi indan disĉiplon!

Sed sciu, ke ankaŭ ĉio, kion *mi* povas doni al vi ĉi tie, originas el la *sama* fonto, el kiu ĉerpis *Jehoŝŭa*, kiel *lumanto de la Pralumo!*

Ekzistas *neniu vorto*, kiun la „granda amanto“ iam parolis pri si, kiun *mi* ne *samamaniere* povus diri pri mi, se estus necese...

Sed en *unu* rilato ankaŭ mi devas plene de admiro klini min antaŭ li, kaj kiel mi vere *scias* pri tio, tiel mi ankaŭ scias, ke *neniu* el miaj fratoj ĉitiurilate *ne* devus respektegoplene klini sin antaŭ li.

Tio unu estas la *mezuro* de la amo, kiu manifestiĝis viva en *li* kaj lia *agado!*

El lia *amo* la vivo doniĝos ankaŭ al *vi*, se vi povas *ekkoni* kaj *spirite kapti*, kion mi sciigas al vi en ĉiuj miaj skriboj.

Bone estas al vi, se vi ne *ofendiĝas* pro miaj vortoj, tial, ke la viro, pri kiu mi tie ĉi parolas, fariĝis „*Dio*“ eble ankaŭ al vi, same kiel al sennombraj homoj en ilia propra imago aŭ en tiu perita al ili de aliuloj, kvankam dum lia surtera vivo neniu vorto estus estinta al li sufiĉe akra, por plej emfaze rifuzi la nuran ideon pri tia diigo!



Sed mi tie ĉi *ne* parolas pri via „Dio“, starigita dum la pasintaj du jarmiloj per la terecaj opinioj cerbume pretigitaj de sennombraj homoj, pri „Dio“, al kiu vi donis la *nomon* de la granda amanto, kiel ordonis al vi viaj malvasthorizontaj instruantoj pelitaj de timo.

Mi parolas *sole* pri la *tera homo unuiĝinta kun la spirito*, homo kiu post la torturado kaj morto de sia tera korpo fariĝis, *kontraŭ* sia volo, la modelo serĉita por home, tro home limigita formado de Dia figuro...

La homa dezirego formi al si diojn laŭ homa bildo estas konata al mi ĝis ĝiaj plej profundaj radikoj, kaj mi certe honoras kune kun vi la altajn homajn formojn, kiuj dum la paso de la jarcentoj devis servi al via bildo de adorado, formita de fidela kredo laŭ homa bontrovo.

Tamen: – mi ankaŭ estas nedisigeble unuigita kun la spirita estaĵo de la historia *homo*, kiu nevole fariĝis la *kaŭzo*, ke tiu bildo de adorado povis esti starigata en lia nomo.

Doni al tiu spirita estaĵo voĉon kaj ateston, estas ordonite al mi de la spirita strukturo de la vivo, kiu naskis min el si, kiel tiu vivo iam estis naskinta ĝin en homa korpo...

Mi povas atendi la tempon, kiam tiuj ĉi vortoj estos rigardataj kiel esprimo nek de orgojlo nek de psika malklariĝo.

## Pri la prafajro de la amo

Ne diru, ke vi havas *amon*, dum vi ankoraŭ havas zorgon *pri vi mem!*

Same kiel la „lilioj de la kampo“, – kiuj en la Oriento kreskas sovaĝforme sur vastaj areoj, – kaj la „birdoj de la ĉielo“, vi *ne plu devas koni la zorgon pri vi mem*, se vi volas fariĝi kapabla por la *amo* en ĝia *plej alta* formo.

Dum ankoraŭ turmentas vin la ordinara timonutrita *zorgo pri vi* kaj *via surtera sorto*, – zorgo, kiu estas nenio alia ol evidenta manko de konfido al tio eterna, – vi vere scias ankoraŭ nenion pri la *amo*, kiun la alta majstro instruis, la *amo*, kiu sola povas doni al vi la *liberecon*. – –

Vi sklavigas *vin mem* al via zorgo, kaj malgraŭ via tuta zorgado vi povas per tio *gajni nenion*.

Sed *la plej dia forto* kuŝas *neutiligata* en vi, ĉar vi *ne scias uzi ĝin*.

Eble vi amas „el la tuta koro“ ĉiujn, kiuj estas por vi „karaj“ kaj kiujn vi neniam volas *perdi* en tiu ĉi surtera vivo; eble vi persvadis vin eĉ al „ĝenerala homamo“, – kaj vi „amas“ la *animalojn* kaj la *plantojn*, „amas“ ĉion, kion vi ekvidas.

Vi forte miros, se mi diras al vi, ke *malgraŭ* ĉio ĉi vi apenaŭ vivas jam *en amo*.

La lingvo de via lando povas ĉirilate instrui vin, ĉar vi kutimas diri pri iu, kiun vi „amas“ viamaniere: «*Ich habe ihn gern.*»\*

Dum vi *tiel* „amas“, estas grave al vi „*havi*“ kaj ke vi sentu *agrablan senton* dum vi tiel „*havas*“, – eĉ se vi „*havas*“ nur per vidado kaj aŭdado, aŭ per la nura konscio, ke kunhomo estanta en loko proksima aŭ malproksima apartenas al vi. – –

Sed la *amo*, pri kiu parolas la instruo de la „granda amanto“ kaj pri kiu tiu ĉi libro sciigu vin, estas spirita kaj samtempe ankaŭ tera pramonda *forto* enteksita en ĉio vivanta, – forto, kiu devas traflui vin tiel, kiel la *malalta* formo de la *sama* forto trafluas vin en trem-sentado ĉion venkanta, kiam vi sentas la amoflamojn de *via tera animaleco* bruli en vi! –

En tiu ĉi „*tera*“ amo vi ankoraŭ *deziregas*, ĉar tie ĉi la *amo* volas ekhavi la *objekton* de la amo, – sed en sia „ĉiela“ formo la amo fariĝas objekto *al si mem*, tiel ke ĉia *deziregado* forlasas vin! –

En la „*tera*“ formo de la amo ĉiam okazas *postulado*, – *ekprenado* kaj *altirado* de io *ekstera*, – sed en

---

\*) Germana idiomaĵo kutime tradukata per „Mi ŝatas lin.“ Ekstreme laŭvorta traduko estas: „mi havas lin kara“, frazo, kiu evidente ne konformas al la lingvouzo de Esperanto, sed donu al la leganto ideon pri la vortoj uzataj en la germana idiomaĵo: unu el ili estas „*habe*“ (*ich habe* = mi havas; *haben* = havi), kiu ludas gravan rolon en la sekvanta frazo.

sia „ĉiela“ formo ĝi fariĝas interna *lumado*, *radiado* kaj *varmigado*, – *superfluido* el la *interno* super ĉion eksteran...

Nur tiu ĉi *alta* formo de la amo estigas ĉiujn verajn *spiritajn miraklojn de interna vekigo*, faras, ke estiĝas „*per si mem*“ ĉio, kion vi ankoraŭ penas akiri, kredante, ke iu ajn mistera metodo, iu speco de „trejniĝo“ povas iam havigi ĝin al vi.

Sed via *afableco al la homoj*, kaj via *postulado de spiritaj posedoj*, kiun vi nomas „amo“, neniam povas havigi al vi la forton, kiu en la plej laŭvorta senco „*estas pli forta ol la morto*“! –

Ĉio, kion vi ĝis nun kutimis nomi „amo“, kiam vi pensis ne nur pri la *malalta* ŝtupo de la amo, en kiu la korpoj reciproke sin deziregas, – ĉio ĉi estos vere *perfektigata* nur tiam, kiam vi mem estos *plenigita* de la *prafajra forto* de la amo!

Tiam *elfluos* el via tuta *esto* tio, kion vi *nun* provas realigi per multa *penado*.

Kion vi hodiaŭ nomas „*devo*“ kaj „*virto*“, tio estos la plej natura *plenumiĝo de via ekzisto*.

Vi ankaŭ ne povas ekflamigi en vi la prafajran forton de la *amo*, sen konstante *elfluigi* el vi ĝiajn *radiojn*, kaj ĉio, kio proksimiĝas al vi, sentos tiun konstantan radiadon.

Kio antaŭe rezistis aŭ atakis vin, tiam venos renkonte al vi, por propravole alianci sin kun vi.

Sed oni postulas de vi internan *returniĝon*, se vi volas *ekbruli* por fariĝi *sunfajro* de plej alta amoforto.

Sen tiu ĉi konscia returniĝo, sen tiu daŭre fiksita nova direktiĝo de via strebado, vi certe ne eniros en la amon.

Vi devos *voli* ŝanĝi vin, se vi volas esti ŝanĝita!

Ĝis nun vi estis *postulanto ankaŭ en la spirita regiono*, – sed oni tie ĉi povas *doni* al vi nur ion, kion vi ankoraŭ *ne posedas*, indiferece, kion vi petas, kaj ĉu vi scias pri la spiritaĵoj jam akiritaj de vi, aŭ ne. –

Sed vi jam *posedas* en vi, kvankam sen via scio, la altan forton de la *amo*, pri kiu mi parolas, tiel ke oni ne bezonas *doni* ĝin al vi, kaj dependas nur de vi, ĉu vi volas *uzi* ĝin, por ke ĝi malkaŝu sin al vi! –

Vi devas *voli* fariĝi „*suno*“, – „*suno*“ lumanta *el si mem*, – kaj kiam vi konstante tenas firme tiun ĉi volon, vi pli kaj pli ardos en la fajro de plej alta energiado de la *amo*!

Vi ankoraŭ sentas tro multan *timon* antaŭ tiu *ekbrulo*! –

Via malsaĝa timo, ke vi povus perdi vin mem, retenas vin de la provo, kiun vi kuraĝu fari!

Vi sentas en vi *moderan varmon*, nomas ĝin „la amo“, kaj volonte kontentiĝas per ĝi, – sed tiam vi miras, ke la radioj de tiu malforta varmo kapablas fari nenion *en vi* kaj nenion *ekstere*, kaj ke ili restas *tute senpotencaj* ankaŭ en via tera sorto. –

Vi ankoraŭ ne suspektas, kiun *forton de radiado* vi *povus* akiri, se vi volus ŝanĝi vin mem en „*sunon*“, anstataŭ neageme nur *atendi* varmigajn aŭ fortigajn spiritajn radiojn de *aliaj* sunoj!

Ekde nun ĉio en vi devas voli *doni*, se vi volas *ricevi* el vi tion plej altan, kio estas *en vi mem!*

Eble tio, kion vi komence havas por *doni*, ŝajnas al vi mizere *malmulta*; tamen tiu malmulto plene sufiĉos por igi vin „*radii*“, kondiĉe ke restas neŝanĝita via volo pli *doni*, ol *atendi* de aliaj!

Pri Hinda princo estas raportite, ke li iam demandis joganon, kiuj estas la sentoj de perfektigiĝinto. La jogano respondis, ke oni iam demandis lin ankaŭ pri la sentoj de amanto kaj li tiam povis repliki nur:

„*Kiam vi estos amanto, vi tion scios.*“

Tial ankaŭ *mi* povas paroli pri la *plej alta* formo de la *amo*, kiu estas eterna, pramonda *forto*, ĉiam nur per bildoj, ĉar mi ne povas *klarigi* al vi ĉi tiun „*ĉielan*“ amon per vortoj, same kiel mi ne povus komprenigi al vi per vortoj tiun *alian* formon de amo, kiun oni no-

mas „*tera*“ amo, ĉar ĝi energias nur en la *surtera ekzisto*.

Ambaŭkaze vi devas lasi la amon *ekflamigi* vin, se vi volas ekscii, *kio* la amo en sia formo ligita al la *fizika mondo*, aŭ la amo en sia plej alta *spirita* formo, reale *estas!*

Vi, kiel *tera* amanto, portas la „*teran*“ formon de amo en vi, ankaŭ tiam, kiam ĝia ardo *ne* ekflamigas vin; tiel same, ankaŭ la „*ĉiela*“ formo de la sama forto estas en vi *ĉiutempe*, kvankam vi ankoraŭ ne konscias tiun ĉi amon, kiu energias foren trans la *teran* ekziston kaj surtere donas al vi *dian liberecon*, ĉar *ĉio*, kio povas renkonti vin, devas sin klini antaŭ ĝi.

Pri *tiu* amo kaj ĝia potenco parolis la alta majstro el Nazareto, kaj *li mem* prenis sian *tutan* forton el tiu ĉi *amo...*

Pri *tiu* amo parolis ankaŭ la amanto, kiu fariĝis la plej granda proklamanto de la instruo de l'majstro, kiam li diris pri si mem: „Se mi ne havus *amon*, mi fariĝus *sonanta kupro* aŭ *tintanta cimbalo*.“ – Ĉiu el la du objektoj ja donas *sonon*, se oni de ekstere *frapas* kontraŭ ĝi, sed mankas al ĝi interna *vivo*, kiu povus estigi la sonon *el si mem*.

Sed la amo, pri kiu ni tie ĉi parolas, ĉiam energias el si mem, *sen* impulso de ekstere.

Kiom longe la homo de la tero sin baros kontraŭ tiu ĉi amo?!

Nur malmultaj homoj *sciis* pri ĝi, – nur malmultaj homoj fariĝis *vazo* por ĝi, – el ĉiuj generacioj, kiuj ricevis la lumon de la tera suno.

La fortoj de la *ekstera tera naturo* jam antaŭ longe ekkonis la homon kiel *reganton*, sed en sia propra *interna* sfero li kontentigas sin per malfortetaj provoj *paktumi* kun siaj fortoj, ĉar li ne *konas* en si la altan forton, per kiu li estus fariĝinta ne nur *mastro de la internaj fortoj de sia fizika naturo*, sed ankaŭ kapabla por plej alta agado en la *ekstera* naturo, – eĉ se nur sufiĉe granda *parto* de la tera homaro sin *unuigus* en tiu forto...

Kie iam animoj *trovis la vojon el mallumo*, kie iam okazis *alta faro*, kiu lumis dum postaj jarcentoj, kie iam la *animalo* en la homo devis sin submeti al la *spirita homo*, tie tiu ĉi alta forto estis *vekiĝinta en unuopulo* kaj povis superflui en multajn homojn por ekflamigi ilin. –

Sed ree kaj ree la ekflamigitoj tuj poste lasis la ĉielan fajron *estingiĝi*, ĉar ili fariĝis tro *inertaj* por doni nutron al ĝi el la siaĵo...

Tiu ĉi malluma tempo de freneza malamo, tempo kiu repotencigis la „dion de la venĝo“, kies potencon *forigi* iam instruis *la granda amanto el Nazareto*, –



tiu ĉi tempo de babilona *konfuziĝo* de la cerboj, de *furiozo celanta neniigi el krea volo*, – tiuj ĉi tagoj, kiuj kvazaŭ *martelobatoj de tuta infero da frenezaj diabloj* falas sur la kompatindan homaron, por transformi tion, kion iam *spirita lumo konstruis* venkante la inertecon de la animalo, en *barbaran kaoson*, en *amasojn da rubaĵo*, – estos *finataj* nur tiam, kiam la potenco de la *amo* alportas tiun finon. –

La bruletanta *incendio*, kiu hodiaŭ sendas siajn nigrajn fumondojn da sufokanta venena haladzo super landojn kaj marojn, ne estas estingebbla per la slogankataraktoj de grandgestaj *parolantoj*. –

La verda foliaro, nun forbruletanta, volis *sunvarmon*, – sed ĉar ĝi ne trovis „*sunlumon*“ en tiu ĉi tempo, ĝi fariĝis, sopirante al lumo kaj varmo, la viktimo de *subteraj fajroj*.

Bone estas al tiu, kiu ne *devas* konfesi antaŭ si mem: „*Ankaŭ mi iam estis unu el tiuj, per kiuj la juna arbaro, kiu nun estas neniigata en mondvasta incendio, sentis sin trompita pri sia sunvarmo.*“

Tie ĉi ne plu estas „*estingebla*“ tio, kio devas forbruleti en si mem, sed oni ne sin *trompu*: – la *sopiro al lumo kaj varmo* ankaŭ ne forlasos la korojn de *tiuj*, kiuj *ne* fariĝas viktimoj de tiu fajrego, ĉar vekis ĝin *praprofunda volo*, kaj neniue potenco de la tero malhelpos ĝian *plenumiĝon*.

Tiu sopiro deziregas la aperon de radiantaj „sunoj“, kiuj ne laciĝas varmigi kaj lumi. –

Ĝi scios distingi, kaj rifuzos ĉion, kio ne radias el *amo*.

Kio nun forbruletas, certe estas perdita, kaj *kune kun ĝi* valora posedaĵo de la homaro, sed la nove ŝosanta verdaĵo de la tero *ne* estos neniigata *duan* fojon kaj *ne* denove fariĝos la manĝaĵo avide serĉita de *subtera* fajro.

Ankaŭ ĉi tie agadas *altaj gardantoj*, kvankam ili *ne* povis malhelpi la neniigon de tio, kio portis *en si mem* la *volon al neniigo*, sen scii pri tio...

La altaj gardantoj, kiuj tie ĉi agadas, zorge *ŝirmos* ĉiun novan junan planton kontraŭ la neniiga fajro; estante veraj amikoj de la homo, plenaj de emo kompreni kaj konsili, ili kompatoplene resendos la klaketantajn skeletojn, kiuj kvazaŭ grandegaj verspertoj en vastaj manteloj flugas antaŭ la suno, en iliajn *tombojn*, tiel ke la lumo de la pra-suno de l'eterna spirito finfine povas doni *al ĉio vivanta la tutan varmon de siaj radioj*. –

Nur el tiu prasuno fluas la forto de radiado al la individuaj spiritaj „sunoj“, kiujn la tera homaro bezonas, kiel la svarmoj da planedoj de l'kosmo bezonas siajn miriadojn da sunoj, por sin teni en laŭordaj orbitoj...

La homaro *ne* estas alveninta antaŭ la „*pereo*“\* de la Okcidento, kiel kelkaj homoj opinias, sed ĝia estonta plej alta *ascendo* postulas la viktimojn, pri kiuj maldorma homo de l'Okcidento hodiaŭ devas lamenti.

„*Kiu havas orelojn por aŭdi, tiu aŭdu!*“

La *signoj* de ĉi tiu tempo devas esti interpretataj vere *alie*, ol reve imagas al si saĝumanta skeptiko, kvazaŭ akrobate jonglanta per pensogloboj kaj serĉanta la aplaŭdon de la amaso.

Kio necesas ĉi tie, estas „*pacienco kaj fido de la sanktuloj*“.

Ne de tiuj, kiuj sin opinias „*sanktaj*“, tial ke ili laŭ la maniero de rampuloj eltiris sin el ĉia implikiĝo en kulpo, sed de tiuj terecaj homoj, kiuj vere antaŭsentas la savon kaj kiuj en ĉiu tempo estis la „*salo de la tero*“.

Jam *niaj nepoj* ne plu konos tiujn ĉi tagojn de *blindiĝo pro frenezo*, kiuj proksimiĝas al sia fino, eĉ se ŝajnas, ke ĝi estas ankoraŭ tre fora.

Ili apenaŭ trovos en si *komprenon* pri la stato de malsaneco de la cerboj, laŭ kies plano hodiaŭ okazas

---

\* Aludo pri la verko de Oswald SPENGLER (1880-1936): „*Der Untergang des Abendlandes*“ (La *pereo de la Okcidento*) (1918-1922).

freneza dancado, ĉar ili, implikiĝinte kun mallumaj potencoj, al kiuj ili donis sin mem, malfermis ĉiujn pordojn al la malsaĝa opinio, ke „la homo“ estas nur la mizera tera animalo, – ankoraŭ multe pli mizera ol ĉiuj aliaj animaloj de tiu ĉi tero, – kiel kiun li sentas sin *tiom longe, kiom li ne scias*, ke li estas por la *spirita* homo la *pordo al liberiĝo*.

Sed tiu scio alportas la certecon, ke sole la plej alta formo de la *amo* povas doni al li la enorme grandan potencon *ŝanĝi* la aspekton de la tero tiugrade, ke ĉia sufero, kiun la homo trovis surtere, – ke *malsano, mizero kaj aflikto* devas *malaperi* de la tero, same kiel malaperis la monstraj bestoj, antaŭ kiuj la frua hom-animalo unue *fugiĝis* kaj kiujn ĝi tiam lernis *venki*.

Ni ĉiuj, kiuj hodiaŭ sentas la mortoombron de tiuj ĉi mallumaj tagoj pezi super niaj kapoj, estas la *tombofosantoj de malnova tempo* kaj samtempe la *generantoj de la nova vivo*, kiu iam vivigu ĉi tiun teron. –

Antaŭ la homaro, kiun tiu ĉi tergloba ankoraŭ portas, *ni ĉiuj* devos respondeci pri nia konduto, kiam tiu kosma voko:

„*Estas finite!*“

sonos tra ĉiuj sferoj, kiuj fariĝis rifuĝejo al la *spirita homo*, post kiam *li mem* iam *malligiĝis* sin el la Dieco kaj transdonis sin kiel noblan *flosaĵon* al *necerta sorto*.

Estas *ni* *ĉiuj*, kiuj *ŝanĝos* la vizaĝon de la tero aŭ restas *malhelpantoj* al tiu ŝanĝo, kvankam nur *estontaj* generacioj povas rikolti *fruktojn*, kiuj respondas al la *semoj*, kiujn *ni* konfidis al la grundo. – –

Sed ne pensu, ke ni ne povos *mem* vidi la plenumiĝon de nia agado, kvankam eble doniĝos al ni nur *floroj* tie, kie estontaj homoj rikoltos la *fruktojn*.

Ju pli frue ni mem kolektas kuraĝon por konscia *agado*, des pli certe ni vidos, ke malfermas el tiu *agado*, kiu estas *agado de la koro*, la *florburĝonoj*, kiuj fariĝos *fruktoj* al niaj posteuloj.

*Ion nekompreneble grandan* la sorto konfidis al nia volo en tiuj ĉi seriozaj tagoj, kaj vere: *estas ĝojo vivi* en tia tempo, por ĉiu, kiu, *maldorme kaj estante konscia pri sia respondeco*, scias ekkoni la valoron de *sia vivo* por ĉiuj venontaj generacioj.

*Kie do ili estas*, la *malsaĝuloj*, kiuj iam kredis, ke la *verko de iliaj cerboj* havas *eternan ekziston*?

*Malaperinta* kiel la plej mizera almozulo, kies nomon mencias neniu raporto, *ilia verko mortas en nova tempo*, kiun ili, kvankam ebriaj de scio, *ne povis antaŭŝenti*, – kies venon ili ne povis vidi, ĉar ili kredis, ke la heleco de *ilia* pensado lumos al ĉiuj venontaj generacioj. –

Ankoraŭ *hodiaŭ* troviĝas inter ni ne malmultaj vantaj malsaĝuloj, kiuj opinias sin saĝaj kaj trovas sian plezuron farante la grandan geston de saĝaj sci-antoj.

Ne ĉiuj *scias*, ke ili trompas, kaj tiu aŭ alia kredas esti servanto de la *vero*, – sed en tiu ĉi tempo de *sen-valorigo* de ĉiuj valoroj aperis tro multaj, kiuj ne plu estas malhelpataj de „*konscienco*“, post kiam ilia iluzia opiniado kaptis *ilin mem*, tiel ke ili per sia instruo tiras *miulojn* en pereon, *ebriiĝinte de sia potenco konfuzi la animojn*, kaj *nebuligite de vanteco pro la nombro da servutuloj sekvantaj iliajn flagojn*. –

„Ĉar leviĝos *falsaj* kristoj kaj *falsaj* profetoj...“

Atentu tiajn signojn de la tempo kaj gardu vin mem, ke vi ne implikiĝu en diablajn retojn, el kiuj nur malofte homo povas liberigi sin.

Same kiel vi ne konfidus vin al *ĉarlatano*, se temas pri la vivo de via *korpo*, vi ne devas transdoni vin kun via *animo* al ĉiu, kiu diras al vi, ke li scias konservi la vivon de *via animo*.

Kvankam vi sentas vin certa nur pri malmultaj aferoj, vi sendube ja portas en vi la kapablon *flarsenti danĝeron*, kapablon, kiu neniam forlasos vin, kiam temas pri la *konservado de via korpo*.

Vi posedas la *saman* kapablon, kiam temas pri la vivo de via *animo*, sed ĉar vi povas *perdi* vian animon

*sen* perdi la vivon de via *tera korpo*, vi apenaŭ plu atentis la avertajn signojn, kiuj prezentiĝas al vi en via interno, se la vivo de via *animo* minacas veni en danĝeron.

Eĉ se vi havas nur iometan juĝkapablon, *malkonfido* baŭmas en vi tuj kiam proksimiĝas al vi *nekompetentulo* por helpi vian malsanan *korpon*; tiel same vi sentos „averton“, kiam en *mizero de via animo* prezentiĝas al vi instruanto, kiu eble *mem* bezonas instruon *pli ol vi*, kiu vokis lin por helpo, ĉar pri alia helpo vi ne sciis. – –

Tial vi tute ne estas *senkulpa*, se vi konfidis vin al *eraranta* instruanto, ĉar la *pranatur*o donis al via sentemo la *kapablon distingi*, kaj estas nur pro via propra *nezorgemo*, se vi ne tuj *ekkonas*, ke vi donis vin al „*animogvidanto*“ kiu *mem* devus esti gvidata sur ĝustan vojon. –

En tiuj ĉi seriozaj tagoj vi devas esti duoble *memgardema*, ĉar per miaj vortoj vi nun scias, ke senombraj venontaj generacioj povas esti *progresigataj*, sed ankaŭ *malhelpataj* de vi.

La *prafajro de la amo* volas fariĝi *vivo* en vi, por ke ĝia vivo, plugenerante el vi, iam formu *novan* vivon, – tie ĉi, en la koroj de la homoj lukte akirantaj al si sur tiu ĉi tero sian *eternan* formon.

Se vi ne *mem* fariĝis vivo el *amo*, kiel vi volas fariĝi origino de *nova* vivo? –

Tial mi devis montri al vi, kiom estas eble per vortoj, kio la *amo* estas, – la *amo*, pri kiu parolas la malnova sciigo, kiu raportas al vi pri *amantoj* en la *plej alta* dia senco. –

Tial mi devis senvualigi al vi la *vivon* de tiu „*plej granda* amanto“, kiu sciis plenumi la *plej potencan* agon de *amo*.

En la fina perfektigo de sia *amo* li malligis, certa pri sia venko, la rigidan katenon, kiu, ekde la unua eniro de *spirita homo* en la formon de la *tera animalo*, tenis ĉirkaŭligita per fera ligilo ĉiun homan estaĵon surteran. –

Sed li ankaŭ instruis:

„*Kiu volas esti mia disĉiplo, tiu sekvu min.*“ –

Ridinde malsaĝaj estas la revuloj, kiuj kredas, ke ili bezonas nur imiti la laŭsupozan geston de tiu ĉi *prapotenculo* per eksteraj, strangaj kondukmanieroj, por esti ekkonata de li kiel liaj disĉiploj.

Se ili *suspektus*, kiu li *estis* kaj *estas*, ili certe demetus sian malsaĝon.

Sed *vi*, al kiu mi parolas ĉi tie, – *ne* estu obeema servutulo de tia iluziado!

Vi nun estas vere sufiĉe instruita.



Se vi volas montri vin vere *inda* je la *ĉarpentisto*, kiu estis *lumanto de la Pralumo*, same kiel tiu forminta *ĉi tiujn* vortojn, tiam estu preta vekti en vi la altan *amon*, kiu devas *konsumi* vin, se ĝi ŝanĝu *vin mem*, estigante en vi novan eston.

Nur *tiam* vi vere estos lia *disciplo*.

Nur *tiam* li scios, ke vi estas en *lia* amo, same kiel li sciis, ke li mem estis en la amo de sia „*Patro*“.

Nur *tiam* li povos agnoski vin kiel estantan unu el *tiuj*, kiujn la „*Patro*“ amas, ĉar ili trovis perfektigon en la „*filo*“ de la *Patro*...

Nur tiam *Jehoŝŭa*, la *ĉarpentisto* el Nazareto, pri kiu rakontas al vi la malnova sciigo kaj kiu estis *fremdigita* al vi fare de servutuloj de malnovaj pridiaj legendoj, – homoj, por kiuj li ŝajnis esti multe tro *proksima* al la *homaro*, tiel ke ili drapiris lin per iliaj pridiaj iluzioj, – nur tiam li *proksimiĝos* al vi, kaj nur *tiam* vi vere povos diri:

„*Mi scias*, ke mia *savanto* *vivas!*“ – la „*filo* de homo“, kiu povis konfirmi al la siaj, ke li *restas* kun ili „ĝis la maturiĝo de la mondaĝo“.

Sole el la forto de la prafajro de l'*amo* estas eble, *teni* tian promeson. –

Certe, por iu en si perfektiginta estas nepriskribeble malmola, daŭre farata ofero, *teni* sin, post la

morto de la tera korpo, en stato, en kiu li restas atingebla por la tere limigita homa sentado...

Sed oni ne devas imagi al si, ke tiu restado, bone konata al mi kaj al miaj samspeculoj, en la sentada kampo ankoraŭ atingebla al terhoma konscio estas mistera „miraklo“!

Temas pri nenio alia ol laŭspiritleĝa *fiksado de la konscio*, – fore trans la vivodaŭro de la terhoma korpo, – ĝis la lasta vibro de anima serĉado en la sfero de tiu ĉi planedo.

Ke tio estas ne malgranda ofero, evidentiĝas el la neceso, ke la lumanto restu en korpo memformita, kiu estas neperceptebla per teraj sensoj kaj tamen ankoraŭ apartenas al la nevidebla *fizika* mondo, – korpo, kiu servas al li kiel portanto de la konscio...

Tiu fiksado de la konscio laŭnature implicas, ke la lumanto devas *kunsenti* ĉiun animan *suferon* de la tuta homaro, kaj nur per la forto de la prafajro de l'*amo* tiu kunsuferado de ĉiu homa sufero fariĝas eltenebla al lia memligita konscio, ĝis la lasta de liaj teraj homaj fratoj eniris en la lumon.

## Sava lumo

La nuntempaj legantoj de tiuj ĉi vortoj estas infanoj de tre diversaj *kredoinstruoj*, kaj estas malfacile direkti iliajn korojn al tiu *alta celo*, de kie elfluas la savaj lumradioj de la *amo* en la mondon de la animoj, – *liberigante* tion, kio estis ligita, por tiam reveni en la *prafonton* de ĉia amo, kiu amon *elfluigas*, ĉar ĝi mem *estas* nur amo. –

Eble ekzistas iu aŭ alia arogante memkontenta „*kredanto*“, kiu ridetante opinias sin *alte supera* al tia instruo, en sia hipnota memtrankviliĝo, ke sole lia grega kredo estas „la vera kredo“...

Kaj *aliaj*, kiujn jam de longe ligas plu *neniu* kredo, devos gardi sin kontraŭ la blinda *emo suspekti*, ke la instruo tie ĉi konigata per miaj vortoj estas nur *renovigaĵo de malnova homara iluziado*, transformita en *novan* krediluzion, kiu, – se tio estus *vera* –, certe ĉirkaŭus la animojn nur per nova *mallumo*.

Sed mi tie ĉi montras kaj al la *unua* kaj al la *aliaj* nur la *bazon* de ilia *propra* ekkonado, – ĉar fina *bazo* mankas al ĉiu *kredo*, kiu ne atingas la *plej profundajn fundamentojn* de sia instruo, kaj ĉiu *scio* havas bazon nur tiam, se ĝi estas ankrita en rokprofundoj, kiuj ŝuldas sian ekziston al la *eterneco*...

*Sava lumo* estas la alta *amo*, kiun mia vorto volas ekflamigi en vi, ĉu vi vivas kiel pia kredanto laŭ *malnova* regularo, aŭ *mem* donas al vi *vian* regularon. –

Kaj se mi atestas pri tiu „*granda amanto*“, kiun malvasta kredopinio rigardas kiel estiĝintan *sole* por ĝi mem, kvankam en ĝiaj *agoj* lia bildo sufiĉe ofte servis kiel insigno de *malamo*, mia atesto estas la faro de lia *propra volo*, ĉar en sia lasta ago de amo antaŭ sia tera morto li konsekris *la tutan homaron*, kaj fariĝis por *ĉiuj* „savanto“ el ligiteco, kiun povis malligi nur *amanto*, kiu *superis ĉiujn*, kiuj surtere vivis en amo, per la mezuro *de sia forto de amofajro!* –

Li, kiu en luma perfektigo donis *sin mem al la tuta homaro*, antaŭe volinte alporti savon nur al la gento, el kiu originis lia tera korpo, estas proksima al *ĉiuj*, kiuj lin vokas, kaj lasas sin trovi, se vi serĉas lin en lia *amo*, – ĉu vi praktikas la *malnovajn formojn*, kiuj entenas ne malmultajn erojn de *saĝo*, kiun vi vere povas *honor*i, se via spirito malkaŝas ĝin al vi, – aŭ ĉu vi, laŭ via naturo, sentas tiajn formojn *fremdaj* al vi kaj scias voki lin el la fundo de via koro nur en *via* maniero. –

Kune kun tiuj, al kies *luma rondo* li jam *apartenis*, antaŭ ol li eniĝis en la teran korpon, li vivas *en la spirita regiono de la tero* en la *realeco* de la *spirita for-*

mo, kiu doniĝis al li, kiam li redonis sian animon en la manojn de sia „*Patro*“.

Mi jam diris al vi, kiom estas direble, en alia libro, ke tiu „*Patro*“ de ĉiuj lumantoj de la Pralumo estas la *spirita homo* lumgenerita el la *Pravorto*, estante mem „*Vorto*“ en la „*Vorto*“ kaj „*Dio kun Dio*“ – la granda „*Maljunulo*“, kiu estas en la „*komenco*“, – kiu mem estas la unua *memformaĵo* de la *Pravorto*, la „*homo de la eterneco*“ *eterne restadanta en sia unua genero*.

Laŭ malnova instruo li estas la plej alta el ĉiuj „*anĝeloj*“, – la „*krono*“ de la *spirita hierarkio*, kiu kreis al si sur la tero la lumantojn de la Pralumo, kiuj estas la „*pontokonstruantoj*“ por la „*granda ponto*“, kiu kondukas la teran homon for el la regno de la animalo, tiel ke li povas retrovi sian *spiritan hejmlandon*, el kiu antaŭ eonoj li eligis sin. –

En ĉiu lumanto de la Pralumo estas tiu „*Patro*“, eterne plugeneranta sian „*filon*“, la lumanton, – estante vere sam-esenca kun ties lumnatura, al kiu la tera korpo estas nur *ekstera vehiklo* por surtere fari tion, kio bezonas *surteran formon* por manifestiĝi en la terhoma vivo. –

Tial la majstro el Nazareto vere povis diri al siaj disĉiploj: „*Kiu vidas min, tiu vidas ankaŭ la Patron*“, – kaj „*Neniu venas al la Patro krom per mi*“: per tio,

kio en mi estas vivo, nome la „filo“ spirite generita de la „Patro“ ...

Helpemaj helpantoj do estas donitaj al vi en via terra vivo, – konstante proksimaj al via *spirito*, se vi scias spirite „voki“ ilin per *agado*. –

„Ne ĉiu, kiu diras al mi: Sinjoro, Sinjoro, eniros en la regnon de la ĉielo; sed tiu, kiu plenumas la *volon* de mia *Patro*,“ – kiu *sentas* tiun volon en si, kaj plenumas ĝin en sia *agado*. –

Via nura *deziro* utilos al vi neniom; – vi devos „voki“ per via tuta *konduto* en via vivo, per viaj farado kaj agado, kaj iu aŭ alia homo neatentita, kiu fidele faris nur sian manan laboron, ofte „vokis“ pli bone ol iu eminentulo, kiu konis ĉiujn profundajn skribojn kaj jam de longe opiniis sin sufiĉe inda, ke helpanto „devu“ proksimiĝi al li, por ke li tiel ricevu *ankoraŭ pli* da „eminenteco“ antaŭ si kaj aliaj homoj.

La homa intelekto elpensis *teleskopon*, kiu entenas sistemon de diversaj vitroj kaj speguloj, kies celkonforma aranĝo rezultigas, ke io plej distanca aperas al la okulo tute proksima.

Se vi volas uzi tian teleskopon, vi devos rigardi nur tra la malgranda lenso, kiun la produktisto destinas por servi kiel okulario.

Vi tiam perceptos la lumradiojn de la ekstera mondo *tiumaniere*, ke io *malproksima* fariĝas *proksima* al

vi, tiel ke vi povas distingi ion, kion vi per la nuda okulo neniam povus distingi.

Tiel same, en la *spirita regiono* vi povas percepti *tion Dian* nur, se vi turnas vin unue *al tiuj*, kiujn la eterna Pralumo *mem preparis* por peri al vi siajn radi-ojn. –

Vi tiam vidos en la lumanto *nur tion Dian*, kaj *la lumanto mem malaperos*, same kiel vi, rigardante tra tiu teleskopo, certe vidos ne *la lenson en si*, sed la malproksiman objekton serĉitan de vi. –

La okulario *sola* certe ne utilis al vi, se ne ekzistus en la teleskopo *aliaj* vitroj kaj certaj spegulsistemoj; tiel same la *lumanto ne povus helpi* al vi, se ne ekzistus la *alta hierarkio de la spirito inter* li kaj la plej interna *Dia praesto*, kiu estu spirite perceptata. –

Vi rigardas kvazaŭ *tra* ĉiuj regnoj de tiu spirita hierarkio en la *plej internan Diecon*, kiam *lumanto de la Pralumo* malkaŝas sin al vi el *tio sia spirita*. –

Tiu ĉi bildo povas fari kelkajn vortojn de la majstro el Nazareto pli facile kompreneblaj al vi, kaj vi tiel ankaŭ lernos distingi, kion li parolis *el si mem*, kiel *tera homo de sia tempo*, – aŭ kie li en aliaj momentoj tute *malaperas* kaj volas aŭdigi al vi nur *la plejinternon de la Dieco*, la *Pravorton*; ĉar kion mi supre diris pri la *vidado*, vi facile povas apliki ankaŭ al la *aŭdado*...

Kaj jen *alia* bildo, por klarigi al vi *ion alian*:

El *ĉiu* tubo de fontano kun multaj elflutuboj fluas la *samspeca akvo* de tiu *unu fonto*, kiun la fontano ĉirkaŭas, kaj tamen *unu* tubo, laŭ sia propra formo, povas doni al la akva ŝprucaĵo *alian formon* ol alia tubo, kiu laŭ *sia* formo rezultigas *ankoraŭ alian* formon de ŝprucaĵo; tiel same *ĉiu unuopa* el tiu *luman-taro*, pri kiu mi parolas, ĉiam donos al vi la *saman saĝon*, la *saman* instruon, eĉ se ĝi ekstere montras, konforme al la individua naturo de l'instruanto, tre malsaman *formon*.

Estos tre necese, ke vi ĉi tion atentu, por ke vi lernu trovi en la *plej diversaj* eksteraj formoj la *unu eternan veron*, kiu povas adaptiĝi al la *individua naturo de ĉiu formanto*, kaj tamen neniam ŝanĝas *sian* naturon. —

El ĉiu instruo, kiun mi vortigas, vi do ricevas *nenion alian* ol tion, kio elfluis el la instruo de *Jehoŝŭa*, la „*granda amanto*“, kaj vi vidos, ke tie ĉi diferencaj manieroj de instruado nutriĝas el la *sama fonto*...

La potenciajn vortojn de tiu ĉi „*granda amanto*“, kiuj lumas al vi *eĉ el sub la ŝutkovraĵo*, vi lernos vere *interpreti*, kiam vi konas *mian* instruon; kaj vi *kompre-nos* mian instruon ĝisfunde nur tiam, kiam *lia* naturo fariĝis ekkonebla al vi tiom, kiom vi *devas* ekkoni ĝin, se vi ne volas, ke *lia* bildo en via menso estas tiom *distordita* per la antikvaj aldoniĝoj, ke



restas nur malmulto, kiu ankoraŭ memorigas pri li, *tia, kia li estis kaj estas.* –

Al la homo de tiu ĉi tempo, kiel kiu mi hodiaŭ devas agi, estas vere malfacile, prepari vojon al la vero kaj heligi *miljaran malheligon*, – sed vere *pli malfacile* estas al mi, demeti ĉian eksteran protektan ĉirkaŭvolvaĵon kaj prezenti la eston de mia *spirita vivo* en nuda sobereco al la vulturaj rigardoj, kiuj estas neeviteblaj tie, kie *vero* senvualigas sur tiu ĉi tero, antaŭ ol la alta *amo* hele eklumigos ĉiujn animojn en vera *amluma ardo*. – –

Tie ĉi la plej amara kaj plej peza *devo* estis plenumata, kaj neniu povas imagi la *bataladon*, en kiu mia plejinterno devis lukti kun la ekstera homo, kiel kiu mi vivas sur la tero, por eldevigi de li la konfeson pri si mem.

La instruo, kiu estis donota per mi al la homaro, certe en neniu rilato atestus la veron *malpli*, se mi estus parolinta eĉ ne unu vorton pri mi kiel *apartenanto* al la spirita multunueco, el kiu ankaŭ la „*granda amanto*“ prenis sian instruon.

Sed tie ĉi *neceso* estis plenumenda; krome, estiĝus konstanta, torde memgarda manovrado kaj kvazaŭ kaŝludo, se mi volus diri, kion mi *devis* diri, sen mencii mian propran *eblon juĝi*, – la *pracertan scion el mi mem*, – kiu estas la *antaŭkondiĉo* de mia instruo.

Tro multe de la *mallumo*, kiu longe erarigis la animojn, fariĝas *hela kaj klara* per tiu ĉi konfeso, ol ke povus plenumiĝi mia deziro plej zorge *kaŝi* la sekreton de mia propra naturo.

Mi do devis servi al plej interna devoligo, kiu ne povis esti deprenata for de mi.

Sed *ne ĉiuj* miaj fratoj havas la devon tiel malfermi sin mem, kaj nur tie, kie *amo ordonas* servi per tio al sennombraj kunhomoj, tia devo estas surmetata sur fraton.

Ĉar kiu do estus iam preta, eĉ por ĉiuj trezoroj de la mondo, prezenti tiumaniere sian plej internan internon, *sen* la plej severa, neŝanĝebla *spirita devo*? –

Tio, kion mi havas por doni al la mondo per la vortoj de miaj skriboj, ankoraŭ lumos al *plej foraj tempoj*, kiam estos jam longe elĉerpiĝinta tio, kio hodiaŭ vidas sin *endanĝerigita* per tiu instruo, aŭ opinias sin pravigita mem eviti ties postulojn.

Kiel tiu „*granda amanto*“, tiel ankaŭ *mi devas* konfesi: mi instruas vere ne „*de mi mem*“, – el mia tera ekkonado, – sed kion la „*Patro*“, al kiu mi servas en *amo*, donis *al mi*, *tion* mi donas *al vi*. –

Kion mi instruas, tio estas nur envortigita prezento de la eterna okazado, pri kiu mi konscias ĉiutempe, tuj kiam mi volas konscii ĝin...

La kapablo tiumaniere ekkoni ĉi tion solan pracer-  
tan estas la sankta heredaĵo de tiuj, kiuj estas la lum-  
generitaj „*filoj*“ de la „*Patro*“.

Mi instruas vin el la abundo de la „*Vorto*“, kiel la  
„*Patro*“ *ordonas* al mi *instrui*, kaj proklamas al vi *sa-  
von* en la plej alta *amo*.

Bone estas al tiuj, kiuj mian instruon ne nur *legas*,  
sed en si lasas *efektiviĝi*, tiel ke ĝi povas *heligi la sen-  
con de ilia vivo kaj fekundigi ilian agadon*.

Per siaj *vivado* kaj spirita *agado* ili tiam venos an-  
kaŭ en la *amon* kaj, ekflamiĝinte en amo, iam al *eter-  
na lumado*.

Tiu lumado el la Pralumo estas via nepereonta *ce-  
lo*, kaj por ke vi iam atingu ĝin, mi provas forigi el via  
interno ĉian ŝuton, kiu ankoraŭ plenigas vin kaj tenas  
vin en mallumo...

Kredu al mi, aŭ ne kredu al mi, – sed *agu* laŭ miaj  
vortoj kaj *kondutu konsekvence laŭ ilia senco*, por ke  
vi akiru en vi mem spiritan *sperton* kaj tiam ne plu  
estu dependa de la konfirmo aŭ dubo de la pensoj  
faritaj de vi mem!

Vere ne estas aroganteco, se mi devas diri al vi, ke  
malmulte gravas al mi via konsento...

Kiel vi nun – *antaŭ* ol vi atingis spiritan *sperton* –  
eble juĝas pri la instruo perita de mi, tio havas signi-

fon nur tiurilate, ke via juĝo povas inklini vin al *agado* laŭ miaj instrukcioj – aŭ deteni vin de ĝi.

Sed via juĝo povas nek aldoni ion al, nek forpreni ion de, la vero de miaj vortoj.

Ne la juĝo de via intelekto, sed nur via *amo* povas igi tiun veron atingebla por vi. –

## La krea forto de la amo

Jam en sia tera *malalta* formo la *amo* manifestiĝas en prapotenca urĝo kaj montriĝas kiel *krea forto*, tiel ke plej antikvaj kultoj esperis trovi *finan misteron* jam en tiu *malalta* formo de la amo.

Ĝis la nuna tempo konserviĝis tiaj kultoj, kaj antaŭ nelonge instruantoj de erarigaj kredoj, serĉinte sur mallumaj vojoj, akceptis la plej pereigan instruon de aziaj sekretaj sektoj, por ke ĝi disvastiĝu ankaŭ en la *Okcidento*. Bedaŭrinde ĝi trovis *pli grandan* disvastiĝon, ol la „rationale pensanta“ publiko de la Okcidentaj metropoloj hodiaŭ suspektas. –

Fatalaj *fortoj de detruado*, elsenditaj el noktonigraj templovolboj de diable fanatikaj azianoj, *tiel serĉas siajn viktimojn inter Okcidentanoj*.

La malsaĝa dezirego akiri „sekretajn fortojn“ kaj kaŝan potencon super la kunhomoj *ne* samamaniere „inicitaj“ estas la plej bona peranto.

La kompatindaj trompitoj nek sentas, ke ili pendas *je nevideblaj irigaj fadenoj*, nek suspektas, ke ilia agado kondukas ilin al celo, kiun ili vere *ne* alstrebus, se ili ĝin konus.

Ili kredas esti sur la spuro de la *solvo* de l'*enigmo de ĉiuj enigmoj* kaj akceptas la aserton de memtrom-

pitaj „adeptoj“, ke sur tiu vojo ili akiros *dian liberecon*, dum ili naive kuras renkonte al la aro da inferaj „*hundoj de la abismo*“, kies lipoj jam gutas pro la avido disŝiri iliajn animojn, same kiel ili jam disŝiris tiujn, kiuj hodiaŭ ŝajnas al ili potencoplenaj majstroj de ilia *diable konfuzita* kredo. –

Certe, ekde praantikva tempo *faluso* kaj *jonio* estis sanktaj simboloj, kaj ambaŭ polusoj formas sanktajn ankrojn de plej profundaj misteroj en la tera vivo, sed kiu tie ĉi volas *serĉi*, antaŭ ol oni serĉas *lin*, tiu sin gardu, ke li ne intermiksi la agosferojn, kun la rezulto, ke li levas el la profundo, anstataŭ „sanktaj ankroj“: *glitajn serpentojn*.

Vere ekzistas *neniu* sfero de okultaj fortoj, kiu donas al trompado tiom da ebloj, kiel la regiono de la *seksa mistero*.

Ve al tiuj, kiuj kredas *trovi* ĉi tie, kion ili serĉas! –

En la plej favora okazo ili vekos siajn *somnambulajn fortojn*, kiuj volonte prezentos al ili ĉiun *trompan bildon*, kiu nutras ilian kredon, ke ili estas „*kvazaŭ dioj*“, ĝis ili malesperante ekkonas, *tro malfrue*, kaj fariĝinte *nesaveblaj*, ke ili aŭskultis la „*serponton de la paradizo*“. –

Kiu scias, ke li iras sur *tiu ĉi vojo*, tiu *rapide forŝiru sin* de ĉio, kio eble ligas lin al tiu vojo, ĉar *la danĝero estas nedireble granda!* –

Sed kiu ne povas, se necese, forlasi pro la „*regno de la ĉielo*“ ĉion, kio estis kara al li, tiu vere *ne estas inda* je la „regno“ kaj ne povos malhelpi, ke li estos elĵetita „*en la eksteran mallumon*“: – se ne al *finaneniigo*, tiam al *eonolonga obtuza turmento* kun la scio pri sia propra kulpo.

Ĉio, kion altaj kaj ofte vualitaj vortoj diras pri la *mistero* ĉirkaŭanta la *teran generan povon* kaj ĝiajn *organojn*, estas vere komprenata nur tiam, se oni scias, ke la fortoj tie ĉi kaŝitaj doniĝas en sia *benoplena* formo nur al la *perfektiĝinto de la Pralumo*, kaj nur kiel neserĉita *sekvo* de la perfektiĝo.

Sed la spirita malligo de tiuj fortoj, ebla por vera vokito, rilatas al tio, kio okazas en certaj „esoteraj“ rondoj, kiel plej alte disvolvita kemio rilatas al la absurda farado de frenezaj fuŝkuirantoj. –

Kiu *ne* apartenas al tiuj spirite perfektiĝintaj, kiuj atingis la plej altan „majstrecon“ *antaŭ ol ili naskiĝis sur la tero*, tiu ĉi tie restu malproksima de ĉia serĉado, ĉar kion li *supozas* trovi, li tie ĉi *neniam* trovos, kaj tio, kion li *povas* trovi, farus lin *viktimo de malmalumaj potencoj*, en kies retojn falis ekde praantikva tempo *miloj kaj miloj* da homoj, ofte admirataj dum ne mallonga tempo de sia vivo kiel „veraj adeptoj“, kaj tiel servantaj al siaj neniigantoj *kiel logaĵo* por pliaj viktimoj de neniigo. –

Mi ne bezonas diri, ke mi tie ĉi konas *ĉiun* sekretan „metodon“, kiu povas malkateni tiajn laŭsupozajn „spiritajn povojn“.

Sed mi ankaŭ konas la *sorton de tiuj*, kiuj malkatenis ilin, kaj tial mi havas la devon *averti* ĉiujn, kiuj volas lasi sin averti. – –

„*Kiu havas orelojn por aŭdi, tiu aŭdu!*“

*La koncernataj homoj* apenaŭ povos fari al mi la riproĉon, ke mi *ne sufiĉe klare* indikis tion, kion mi prefere *ne volas* indiki ankoraŭ pli klare. –

Sed al vi ĉiuj, kiuj serĉas *lumon* kaj *iluminiĝon* kaj ne deziras transdoni sin al *trompaj fortoj*, al kiuj fariĝas alirebla nur tio, kio *dum sennombraj generacioj estis akumulata en viaj korpoĉeloj*, – al vi ĉiuj mi volas montri la agadon de la *kreaĵ povoj* de la amo, kiuj povas doniĝi al vi sen iu danĝero: – en tiu alta „ĉiela“ formo de la eterna amo, kiu fluigas en vin vivantan *lumon* kaj *lumantan sunfajron*, same kiel ĝia malalta „*tera*“ formo ekflamigas la fajron de la sensoj, *por konservi vian specion* kaj igi vin *antaŭsenti* en tiu ĉi ardo, ke ĝi vere estas kapabla ankaŭ por *io pli alta*.

Ankaŭ en la *malalta* formo de la amo estas trovebla *io vere Dia*, por ĉiuj, kiuj jam ekkonis, ke *tiu ĉi* formo kaj la *plej alta* formo de la amo havas la *saman* esencon kaj diferencas nur en siaj *manieroj de efikado*...



Tiaj homoj *ne* serĉas „okultajn fortojn“ en la tera amo, – sed ili ja povas, se *anima sentado transfiguras* la korpan unuiĝon, trovi en ĝi la unuajn *tremsentojn antaŭsentigajn*, kiuj kondukas ilin al la *plej alta* formo de la amo, – tien, kie ĝi fariĝas „*ĉiela*“, ĉar ĝia agado leviĝas alte super tiun ĉi surteran vivon, alte *super la plej forajn stelojn*, en la puran lumregon de *eterna* formado, kiu malfermiĝas nur al tiuj havantaj „*puran koron*“.

Sed ne *nepre* devas doniĝi al vi surtere „*tera*“ amo, por ke vi atingu la plej altan „*ĉielan*“ formon de la *sama* forto.

Certe, vi *ne fuĝu* de la „*tera*“ formo, kiam ĝi volas proksimiĝi al vi en *anima transfiguriĝo*, – en edzeco tenata vere sankta, – sed se vi eble rigardas ĝin *nur* kiel kontentigon de *seksa dezirego*, tiam ankaŭ mi konsilas al vi *deteni vin*, kvankam estas tre, tre malproksima de mi la erara opinio, ke abstinemo pri „*tera*“ amo estas la prezo postulata por plej alta anima disvolviĝo. –

Sed prefere *konscie rezignu teran eblon fariĝi feliĉa*, ol ke vi *profanus* la sanktan fajron en *animaleca seksardo*.

La plej alta, „*ĉiela*“ formo de la *amo* povas senvaliĝi al vi eĉ en via plej sobra ĉiutaga laboro, kaj ĝi

*doniĝis* al pli ol unu homo simpla, kiu sidis antaŭ *tek-silo* aŭ iradis post *plugilo*, dum aliaj homoj proklamis ĝin *de sur altaj ambonoj* dum sia tuta vivo, *sen iam trovi ĝin en si mem.* – –

Eĉ tie, kie vi kredas praktiki nur penigan *laboron ĉiutagecan*, ĝi povas disvolvi en vi sian *krean povon...*

Ankoraŭ multe pli forte ĝin sentas ĉiu homo, kiu scias, ke li estas vokita al *krea* agado, – kiu mem *formas*, kion formi la spirito pelas lin.

Neniu granda verko de vera *arto* iam estiĝis sur la tero, sen la *krea potenco de la amo*, kiu plenigis la formanton!

Sed vere estus eraro de malvasta pensado, se la *artista* opinius nur sin mem tiumaniere favorita.

Ekzistas multaj specoj de farado tie ĉi surtere, en kiuj en *alia* maniero, malpli videbla, la *krea povo de la amo* devas plenigi la aganton, se la verko de lia vivo atingu la plej altan *konsekron!*

Pli ol unu speco de farado, kiu estas tre *malproksima* de la sfero de alta *arto*, povas montri, rigardate de pli alta vidpunkto, la manifestiĝon de la *samaj* paraleĝoj, kaj postuli la *saman* krean impulson, kiu en la verko de *artista* montriĝas nur *pli evidente.*

Por la homo ekzistas *neniu* tera farado, kiun la alta *krea forto* de la amo ne povus *malligi* el la kateno de ĝia malvasteco.

Sed se vi volas ekkoni la krea forton de la „ĉiela“ amo en ĝia *plej miriga* efiko, tiam vi devas transdoni al ĝi vin *mem kiel materialon por formado*.

*El vi mem vi vane* provos trovi *vian plej altan formon*, tiom longe, kiom vi ne volonte pretas *lasi vin ŝanĝi* fare de la krea forto de la *amo*.

Vane vi tagon post tago penos fajli kaj glatigi je vi mem, tiom longe, kiom vi malhelpas la „ĉielan“ formon de la amo formi *el vi mem la dian bildon*, kiu montru, ke la spirito estas *enkorpigita* en vi!

Ĝi neniam povos formiĝi en vi *nur el la efiko de via forto de formado*, kiom ajn la eterna *krea forto de la amo bezonas por sia agado* viajn proprajn fortojn de agado, kiujn ĝi mem donis al vi. –

Vi certe *ne estu neaktiva*, kaj viaj *propraj fortoj* povas nur per konstanta *praktikado* tiom plifortiĝi, ke ili vere fariĝas *ilo* al la alta *krea forto de la amo* por formi vin mem; – sed vi devos konfidi la ilon nur al la spirita *majstreco* de la plej alta amo, se vi volas vidi *vin mem atingi la plej altan formon!*

Eĉ tiam, iu aŭ alia *eksteraĵa afero* ne daŭre submetiĝos al tiu plej alta formado, kaj vi ĉiam devos teni la ilon *taŭga*, por ke la alta formo jam donita al vi ne *malkresku*, tiel ke restas nur torsa fragmento, kiu *dolorige memorigas* pri tio, kio jam estis formita...

Ĝis la hodiaŭa tago neniu tera homo estis perfektigata de la *krea forto de la amo*, kies alta formo ne estis *minacata* de la senripozaj detruaj fortoj de la surtera vivo, kaj se vi eble supozas, ke la *lumantoj de la Pralumo* estas tiurilate libera de ĉiuj zorgoj, mi devas diri al vi, ke *ankaŭ ili*, kiel ĉiu homo penanta unuigi la vivon de la *animalo* al *tio sia eterna*, devas ĉiuhore teni sin *maldormaj*, se ili ne volas fali el la alta lumado, kiel stelo, kiu subite falas en abismon kaj tie malintegriĝas en siajn praatomojn.

En sia ekstera vivo tia falinto fariĝas terura *fanatikulo de malico*: – homo tute senskrupula, kiu trovas sian plej grandan memĝuon en la *detruado* de ĉio, en kies *konstruado* li iam partoprenis...

Tial ĉiam restas enorme granda risko por ĉiu homo spirite preparita, libervole akcepti la vokon al unuigo de la spirita homo kun la homa animalo, ĉar lia surtera vojo estas, multe pli ol tiu de ĉiuj aliaj homoj, minacata de sennombraj nevideblaj danĝeroj.

Vi tial devos lerni ekkoni, en la *lumanto de la Pralumo*, *homan fraton* kiu – estante vere *ne* liberigita de ĉia terhoma erarado – *devas batali kiel vi*, por eliri el la batalo de la lumo kun la mallumo kiel *venkinto*, kiam lia surtera vivo finiĝas.

Ke oni instruis vin rigardi la altan lumanton, kiun ni nomas la „*granda amanto*“, kiel „*Dion*“ senpekan kaj *liberigitan* de ĉiu *kapablo* kulpiĝi, – tio *forte ne-*

*bulis* vian juĝpovon kaj tiam *reĵetis* vin en regnon de *mizera senpoveco*, en kiu deziras teni vin tiuj, kiuj *nur tiel* povas ĝui sian *potencon* aperi al la *sklava malriĉeco*, surmetita sur via animo, kiel la *mastroj de ĝia sorto*. –

*Ne ĉiuj*, kiuj donas al vi tiun dubindan instruon, faras tion *konscie*.

La plej multaj el ili kredas, ke ili kondukas vin al via *feliĉo*, al vera, eterna *savo*.

Ili hodiaŭ apenaŭ suspektas la *pereigan efikon* de la homa orgojlo, kiu montriĝas en ilia farado kaj dum jarcentoj fariĝis kutimo, kaj ili *reale* kredas, ke la *savo de via animo* estas en danĝero, kiam vi volas *forlasi* ilian instruon, ĉar, profunde en via koro antaŭsentante la veron, vi finfine ekkonis la *erarecon* de tiu instruo.

Mi *petas* vin, ke vi ne riproĉu al tiuj instruantoj la erarecon de ilia *instruo*, kiun la plej multaj el ili sekvas vere nur „bonafide“.

Ili certe povus gvidi vin ankaŭ sur *pli bonaj* vojoj, tuj kiam *ili mem* estus trovintaj tiujn pli bonajn vojojn, ĉar ankaŭ ilin plenigas, – multe pli ofte ol vi eble pensas, – la alta volo *helpi vin!* –

Sed neniu, kiu *vere* havas zorgon pri via *animo* kaj pri ties eterna *savo*, rifuzos al vi la eblon ekzameni vojon, kiun vi trovis *sen li*, ĉar li jam de longe konas

la pezan ŝarĝon de *respondeco*, kiun lia ofico metis sur lin. –

Nur tiu, kiun pelas orgojlo kaj kiu timas perdi sian *potencon* per via ekkono, indigne ĵetos „de supre“ torrenton da paroloj kontraŭ vi, diros al vi *mil* „*kialojn*“ por igi vin *reveni* en la ĉirkaŭbaritan paŝtejon, kiu estas tiom kara al *li*, krom tiu *unu* kialo *pelanta lin en lia profundo*: – teni vin *tie*, kie vi staris, antaŭ ol la *vero* el la *amo* povis atingi vin. –

Homo tiel timanta pri sia *potenco* vere estas jam de longe *malproksima* de ĉiu *krea forto de la amo*.

Vi *ne devas* sekvi lin en liajn *labirintojn*, kiujn *li* kaj *liaj samspeculoj* ruze elpensis *por ĉiuj*, kiuj deziras eligi sin el ilia *potenco*, – *potenco*, kiun opinias *delikata* tiuj praktikantaj ĝin, eĉ se ili *mem*, la „*potenculoj*“, bone *ekkonas* en la fundo de sia koro, ke ilia *potenco* estas bazita nur sur la *neekkonado* fare de iliaj sklavoj. – –

Kiu unufoje ĝuis la *ebrion* de tiu *potencavido*, tiu estas *perdita* por la voĉo de la *vero*, estas *perdita* por la malindulge fiksitaj spiritaj kondiĉoj de la *vero*...

Sed vi certe ankaŭ ne koleru kontraŭ tiuj perditaj por la *vero*, se vi volas transdoni vin al la *krea forto de la amo* por via *propra*, plej alta formado!

Alie vi estigus obstaklon, kiu devus *severe malutili al* via *propra* formado.

Vi, kiu sopiras al *lumo* kaj *lumado*, – lernu esti *kompatema* ankaŭ al *tiuj*, kiuj plej volonte tenus vin en sia *mallumo*!

La plej multaj el ili estas *ne mem* kulpaj pri tio, ke ili devis *fariĝi* tiaj, kiaj ili hodiaŭ *estas*, – kaj por multaj estas *tro malfacile*, sentime eligi sin el *katenoj*, kiuj ofte estas por ili *la sola eblo savi sin* de la falo en eĉ *pli profundan* mallumon, por ili, kiuj tre forte sentas en ĉiuj siaj fibroj, ke nur fortika *kateno* povas doni al ili firman *subtenon*. –

Por multaj el tiuj blindaj blindulgvidantoj, la timo pri la sekiĝo de la fonto de vivrimedoj estas sufiĉa motivo por plue servi al la ekkonita eraro, kiun ili volonte forlasus, se ili scius, de kio ili estonte vivu, kune kun tiuj, kiujn ĝis nun ilia salajro nutris.

Pri la *oferoj* faritaj pro la „peko“ de longe forgesitaj generacioj devas hodiaŭ plendi la posteuloj, kaj la homaro aldonus *novan* kulpon al la malnova, se ĝi riproĉus al la kompatindaj katenitoj, ke ili ankoraŭ portas la rigidajn ligilojn de la *pratempo*. –

Sed la homoj ankoraŭ *kapablaj* movi siajn brakojn *subite mirigos* la mondon, kaj eĉ *ne unu* el ili mankos en la agado.

Kviete ili sin preparos por la tago, en kiu ili *rompos* siajn katenojn, – *sen* vundi malnovan sanktigit-aĵon.

Ili ne plu toleros „la abomenindan ruinigon de sankta loko“ kaj nove starigos la sanktejon.

Ili ne plu kredos al tiuj dirantaj: *tie ĉi* aŭ *tie* estas la „mesio“; kaj ne malmultajn, kiuj venis „en lia nomo“, ili senigos je ilia gloro.

Ili vere *ne* detruos, kaj *tamen* tio preskaŭ senviva *renoviĝos*, ĉar ili *tralumos* la *malnovan formon* per la tuta abundo *da vivo*, kiun ĝi povas enpreni.

La tago, en kiu tio komenciĝos, estas ankoraŭ ne determinebla, – sed ke ĝi iam aperos, estas tiom certe, kiom estas certa la apero de nova tago post malluma nokto.

Lasu al viaj instruantoj *tempon* por *serĉado*, kaj kiam ili *trovis*, aŭ eĉ estis *trovataj*, ili gvidos vin – aŭ almenaŭ la infanojn de viaj pranepoj – sendube aliamaniere ol ili hodiaŭ povas. –

La plej bonaj inter ili konfesas *mem*, ke ankaŭ ili ankoraŭ *serĉas*, kion ili opiniis *trovita*, kiam ili, plenaj de sankta entuziasmo, deziregis preni sur sin la ŝarĝon de sia ofico.

Ne kredu, ke vi trovos la senmakulan spuron de la luma vero en iu ajn *alia* komunumo sur tiu ĉi tero, eĉ se ĝi eble sin vualas per la eluzitaj manteloj de antik-



va mistiko kaj kun multsignifa gesto sciigas vin, ke *nur ĝi sola* gardas praprofundan „sekreton“.

Certe, ankaŭ tie multaj seriozaj serĉantoj laboras por serĉi en la hieroglifoj de antikvaj temploruinoj la *vorton*, kiu povu iam liberigi ilin.

Sed ankaŭ *tie ĉi* jam antaŭ longe fariĝis konate al ĉiuj spertuloj, ke *novaj* vojoj devas malfermiĝi, se la serioza serĉantaro ne perdiĝu en la *mallumaj kriptoj*, kiuj ĉiam denove promesas finfine „*lumon*“ kaj tamen igas la homon pene palpantan fali en *seniluziigon* je la fino de sia vojo, escepte se la vanta gesto de „scianto“ sufiĉas al li, – se li, konfuzite kaj ne plu trovante elirejon, sentas plezuron en la brilo de „ranĝo“, ĝojante pro la „bona fido“ de la trompitoj, kiuj kredas, ke li atingis la celon...

Ne malmultaj serĉas tie ĉi tre dubindan *anstataŭaĵon*, ĉar oni opinias *netrovebla* la *oran trezoron* kaŝitan en la plejinterno de la sanktejo, ne plu konante la subliman *konstruplanon* de ĝiaj altaj haloj.

Avide oni traserĉas ĉiun okultan *kloakon* por trovi tion, kio estus atingebla por kuraĝulo nur sur sunlumigataj *montopintoj*...

Sed ankaŭ ĉi tie venos *renovigo* per la *krea forto de la amo* en ĝia plej alta, „*ĉiela*“ formo, kvankam kelkaj *flankaj haloj* nove konstruitaj jam estas subfositaj de tiu noktonaskita instruo, kiu serĉas la finan

solvon de ĉiuj enigmoj en la regiono de la *terligita* formo de la amo...

Kiun tio *koncernas*, tiu min *komprenos*, kaj al kiu la aferoj tie ĉi aluditaj estas *fremdaj*, tiu sciu, ke mi skribis tiujn ĉi lastajn vortojn ne por li.

Kion mi donas en tiu ĉi libro, tio alportu *al ĉiuj* lumon sur iliajn vojojn, kaj ĉiu serĉu en ĝi tion, kio povas servi al *lia* aŭ *sia* vojo!

*Neniu* serĉos *vane*, kaj ĉiu povos trovi la *siaĵon*.

La *krea forto de la amo* ŝanĝos en *lumon* kaj *vivon* tion, kion mi tie ĉi povis nur *envortigi*, por montri al tiuj, kiuj en la nuna tempo estas en *mallumo*, la vojon de la *lumo*, sur kiu la *vivo* povas, hele radiante, *disvolviĝi* en *feliĉo* kaj *ĝojo*. –

Sed ĉiu *rikolto* postulas antaŭan *semadon*, kaj sekve vi, al kiu mi tie ĉi parolas, certe ne ekhavos fruktojn nur per la portempa okupiĝo pri miaj vortoj, sed nur per rezoluta *agado* laŭ mia instruo.

Tiuj kun mi vivantaj el la „*Patro*“ en la *amo*, rigardas tiun ĉi tempon kiel preparitan por ricevi tiun instruon.

Nur tial, ke ankaŭ mi ekkonas la mizeron de la tempo, mi lasis igi min skribi tiun ĉi libron.

Ankaŭ tiu ĉi libro entenas *neniun vorton*, kiun iu el miaj altaj fratoj ne povus aprobi, kaj *sole ili* estas kapablaj juĝi, ĉu mi plenumis la taskon donitan al mi

tiel, kiel estis *ordonite* al mi, – ĉu mi instruis nur tion, kion la „*Patro*“ ordonis al mi instrui. – –

Sed estas *mi*, kiu havas la plenan respondecon por ĉiu el miaj vortoj!

La homoj, al kiuj providenca okazigo, – kiun ili nomas „hazardo“, – enmanigis tiun ĉi libron, lasu gvidi sin per miaj vortoj al la *plej alta amo*!

La *lumo*, kiu, laŭ pia legendo, doniĝis al la paŝtistoj „dum ilia *nokta gardado*“, atingu la korojn de *ĉiuj*, kiuj hodiaŭ en la mallumo de tiu ĉi tempo tenas sin maldormaj, kaj tiel alportu la *pacon*, post tiuj ĉi tagoj de furioza batalado, al ĉiuj, kiuj ankoraŭ estas plenaj de „*bona volo*“!

La alta *krea forto de la amo* tiam instruos al la veikiĝintoj doni al la *vivo* novan *formon*.

Malproksima de ili estas la erara opinio, ke la *alta templo de la homaro* estas konstruebla nur el *ruineroj*, kaj ĉiu konsekros *sin mem* kiel „konstruŝtonon“, post kiam li ekkonis, ke la plej alta sanktejo de la *vivo* povas esti konstruata nur el *io viva*.

En tiu ĉi libro mi certe ne lasis nedirita ion, kion scii estas al vi necese aŭ nur utile, kaj se mi ekkonis, ke en ĝia unua eldono iu aŭ alia demando ankoraŭ ne estis traktata, mi tie ĉi, en la definitiva formo de la libro, donis sufiĉan respondon.

Mi ne turnas min al romantikaj troentuziasmuloj avide serĉantaj iajn miraklojn, kaj ne al la multaj homoj, al kiuj la realo aperas sen-esenca, ĉar ili povas vidi nur la trembriletantan bildon kreitan de ilia propra fantasta revaro.

Tiu ĉi libro, same kiel *ĉiuj* miaj libroj, estas skribita por *maturaj, sobraj* homoj, – por homoj, kiuj, kviete laborante je si mem, volas kunhelpi en la spirita transformado de mondo, kies vizaĝo povas esti liberigata el la distordantaj spasmoj, kiuj rigidigis ĝin kvazaŭ maskon de freneza teruro, nur per la plej alta *spirita* formo de la *amo*.

Nur kiam oni komencas ekkoni, ke la formo de la homa kunvivado sur tiu ĉi tero estas difinata *per la laboro de ĉiu unuopulo je si mem* kaj estas influebla de ekstere en nur tre limigita grado, oni povas esti certa, ke oni estas sur la vojo, al kiu mi celas konduki la homojn al mi konfidantajn.

Ĝi estas la *sola* vojo, kiu kondukas el la konfuzaĵo de la nuna tempo supren al la klareco de valormontranta superrigardo, kaj samtempe la sola vojo, kiu ebligas al erarvaganta unuopulo trovi en si la *pacon*, kiun ĉiuj koroj ankoraŭ ne tute hardiĝintaj tiom arde sopiras.

Animaleca *batalemo* tiam ne plu povos *senbride* furiozi kiel faktoro de detruado meze de la homa socio, sed, *sublimigite* al *spirita* defendopovo, ĝi kapa-

bligos ĉiun el la multaj unuopuloj rebati *en si mem* ĉiun atakon de malaltaj okultaj potencoj kontraŭ la propra animo, – plene konsciante la *solan* forton kapablan venki ĉiujn detruajn instinktofortojn, kiuj surtere minacas la feliĉon.

Fino

Tradukoj de pliaj libroj  
el la spirita verkaro de Bô Yin Râ  
estas elŝuteblaj ĉe jena retejo:  
<http://www.a-rehfeldt.de>